



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aŭgusto 2017 n-ro: 20



Merhaba,

Aĝustos sayımızla gene birlikteyiz. Bu sayımızda dergimize orijinal olarak yazılıp gönderilmiş onbir adet makale var:

- Türkiye'den Başak Aray'dan iki, Fatma Erdoğan'dan bir yazı.
- Japonya'dan Egawa Harukumi'nin bir yazısı.
- İsveç'ten Raita Pyhälä'nun bir röportajı
- Yunanistan'dan Koros Lesvos takma adı ile bir seyahat anısı, Spiros Sarafian'ın doğrudan bizim için yazılmış olmasa da yepyeni bir yazısı.
- Fransa'dan Rolland Platteau'nun kısa bir çevirisi.
- Roman'yadan Lenke Szász güzel bir şiiri.
- Haluk Mesci ve Ahmet Özışık'ın yazdığı ve beğendiğim için Türkçe'den yaptığım iki çeviri.

Ancak dergimiz için yazılmış olmasa da diğer yazılar da bunlar kadar güzel ve ilgi çekici.

İyi okumalar...

Saluton,


Ni denove estas kune kun vi pere de nia aŭgusta numero. En ĉi tiu numero estas dekunu originalaj verkoj senditaj al nia revueto:

- el Turkujo du verkoj de Başak Aray kaj unu de Fatma Erdoğan.
- el Japanio unu verko de Egawa Harukumi.
- el Svedio unu intervjuo farita de Raita Pyhälä.
- el Grekujo unu vojaĝ-memoraĵo de Koros Lesvos (tiu ĉi estas kaŝnomo), kaj eĉ se ĝi ne estis verkita por nia revueto, unu tre nova artikolo de Spiros Sarafian.
- el Francio unu mallonga tradukaĵo de Rolland Platteau.
- el Rumanio unu bela poemo de Lenke Szász
- Kaj du tradukaĵoj de mi faritaj el la belaj verkaĵoj de Haluk Mesci kaj Ahmet Özışık.

Sed ankaŭ la aliaj artikoloj de nia revueto estas tiel bonaj kaj legindaj, kiel tiuj supre.

Bonan legadon...

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
"Mirinda Lvivo" 2017 E-renkontiĝo	4
Efika Komunikado por Junularo	5
Esperanto fariĝis 130 jaraĝa en la 26-an de julio	6
Kia izoleco mia sen kunparolantoj!	7
Du minutoj	8
Destino	8
Al mia nekonata avo	9
Homoj, kiuj satas katojn...	9
La mekanizmo de Antikiteroj	10
Ŝi An (Xian laŭ ĉina)	11
Intervjuo kun Kerstin Rohdin	13
Perseo - greka mito (3/3)	14
Kio ni estas kaj kion ni celas (7)	16
Dankon Amiko (7) - de Claude Piron	17
El la libro de "Dao de Jing" (12)	18
Mallonga Historio de Filozofio (19)	19
Nekrologo: Michael Bond	20
Tahsin Yücel kaj lia romano "Mensogo"	20
Ŝercoj	22
Kurĉvort-enigmo	22
Kia estas la Usona Landa Kongreso?	24
Ĉu ni konas nian historion?	25
Esperanto Kurso (19)	26
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (7)	27
El Bulgara Esperantisto - aprilo-junio 2017	28
Kuiru kun mi	28
Fariĝu individua membro de UEA	28

Kursoj



1) La kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbulu daŭras.
2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.
3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

4) La du kursoj pri "Lingvoakirado" en la fako de "angla-instruisto" ĉe Erciyes universitato en Kayseri urbo, en kiuj ĉeestis sume 70 studentoj, finiĝis sukcese. La studentoj memlernis limigitan Esperanton dum kaj post la lernejoj horoj kaj ili uzis tiun sperton kiel eksperimento por malkovri kiel homoj lernas trian lingvon. Ĉu la bazo estas la denaksa lingvo, aŭ ĉu iu alia



Ni estis informita de la profesoro, ke la studentoj sukcese uzis la limigitan Esperanton kiun ili lernis, kaj en la fino de la lerneja jaro ili observis simplajn sed interesajn rezultojn. La instruisto pripensas konduki la saman eksperimenton ankaŭ venontjare.

Kiam rezulta informilo estos pretigita pri la eksperimento mi tradukos ĝin kaj anoncos en nia revueto.

Kompreneble la celo ne estis la lernado de Esperanto sed per tiu eksperimento almenaŭ 70 studentoj konatiĝis kun kio estas Esperanto kaj eĉ limigite ili lernis la lingvon.

Ekspozicio

La Litova Unesko Komitato en la 9-a de aŭgusto organizas ekspozicion kies temo estas "Zamenhof - La kreinto de Esperanto" omaĝe al memoro de la centjariĝo de la morto de Zamenhof. Dekstre estas la afiŝo de tiu ekspozicio.

PARODA

ZAMENHOF

ESPERANTO KALBOS KŬRĜJAS
LA KREINTO DE ESPERANTO

2017 08 09 - 09 19

Lietuvos nacionalinĝs UNESCO komisijos galerijoje
(Ŝv. Jono g. 11, Vilnius)

Įėjimas laisvas

LEHUIS INSTITUTAS VILNIE
Lietuvos nacionalinė UNESCO komisija
GAM

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Finiĝis la 8-taga, mallonga sumoo kiu okazis inter la tagoj 2 kaj 9 en julio. En tiu ĉi sumoo rimarkindas la jenaj aferoj:

1. La nombro de la partoprenantoj estis 333 el 31 landoj. Okazis iom da malkresko pro tio, ke tajvanaj kaj svisaj gelernantoj ne partoprenis pro somera feriado.
2. Koreo okupis la unuan lokon kun 102 partoprenantoj. Ĉiuj 102 homoj perfekte venkis 8 tagojn. Mirinda afero. La dua: Japanio (66), la tria: Francio (34), la kvara: Brazilo (18), la kvina: Pollando (17), la sesa: Vjetnamio (14)
3. Nove partoprenis unu el Puerto Riko.
4. Ĉi-foje 4 novaj kunlaborantoj laboris.

>>> El Turkujo partoprenis nur du luktistoj, kiuj venkis perfekte.

>>> Turkujo estis la 24-a en la listo de landoj laŭ la nombro de partoprenintoj.

La septembra sumoo okazos ekde la 10-a de septembro dum 15 tagoj.

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>



UEA



N-ro 687 (2017-06-14)

Alvoko al aperigo de Esperanto-kursoj en lernejoj

Estas lanĉita vasta alvoko por ke ĉiu instruanto kaj ĉefe instruisto de EO ĉirkaŭ la mondo enskribiĝu en la oficialaj listo kaj mapo disponeblaj ĉe Edukado.net, kiuj entute nun arigas sep kursojn en lernejoj (en Belgio, Francio, Pollando, Svislando); sep en kolegioj (en Ĉinio, Francio, Germanio, Rumanio, Slovenio, Svislando) kaj kvar en liceoj (en Francio, Serbio, Turkio): vidu

<http://edukado.net/kursejo>.

Komunikado pri tiaj kursoj allogos novajn lernejestrojn kaj povos konvinki la ĝeneralan publikon kaj landajn edukado-sistemojn prezenti al junuloj Esperanton por la plejbono de la plimulto.

En februaro 2017, la franca ministerio pri edukado oficiale sciigis apartan komisionon de EO-Francio, ke eksperimenta EO-instruado povas jam ekokazi, kie lernejestroj bonvolos (legu raporton pri la agado en la revuo EO, junio 2017, p. 143). Notinde estas, ke la ministerio pripensas plivastigi la enkondukon de tiu lingvo en la franca edukada sistemo, se sufiĉe da gelernantoj kaj instruistoj montriĝos interesataj lerni kaj instrui EOn post kvinjara taksado de la atingitaj rezultoj.

Per ĝisdatigo de la lernejo-listo eblas helpi enkondukon de EO en la franca eduk-sistemo, kaj interŝanĝojn inter lernejoj pere de la lingvo. La ĝisdatigon eblas fari ĉe: <http://edukado.net/kursejo>.

Fonto: <http://uea.org/aktuale/komunikoj/2017/Alvoko-al-aperigo-de-Esperanto-kursoj-en-lernejoj>

TEJO



Partoprenu IJK-n – speciala okazo nur por afrikanoj
Partoprenu IJK-n

– speciala okazo nur por afrikanoj estas plilongigita ĝis la 18-a de julio! Ankoraŭ vi povas aliĝi! Danke al donacoj de pluraj esperantistoj, TEJO sukcesis starigi specialan fonduson por ebligi multajn afrikajn gejunulojn partopreni la Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Aneho, Togolando. Se vi estas aktiva junulo el ajna afrika lando krom Burundo, Benino, Togolando aŭ Kongo (Kinŝaŝa) kaj emas **[read more...]**

Scienca sesio dum IJK 2017

Scienca sesio okazos dum IJK – Internacia Junulara Kongreso 2017 en Togolando! Junaj sciencistoj, esploristoj, fakuloj prezentos siajn kampojn en 5-10 minutoj! Prelegu ankaŭ vi! Sendu vian nomon kaj 3-frazan priskribon pri via temo ĝis la 28-a de julio al gro.ojetnull@afs! Ekzemple: La danĝeroj de intensiva bredado. Intensiva bredado de bestoj estas bezonata se la kreskanta **[read more...]**

Aktivula Akademio de TEJO

Ĉu vi ŝatus lerni kiel agadi pli efike por Esperanto? Ni ĝojas anonci al vi la lanĉon de la Aktivula Akademio de TEJO, la plej enhavoplena platformo de kunlabora lernado por aktivuloj. Eblas trovi en ĝi kurson interalie pri teamlaboro kaj negocado, fotarojn, informilojn, liveraĵojn de trejnadoj, informojn pri projektoj kaj multon plian! **[read more...]**

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Mi profitas de la Esperanto-Sumoo okazaĵo por vin gratuli pri la revuo Turka Stelo, kies inteligenta kaj sensebla enhavo, multe plaĉas al ni. Tiu modelo, kiu ne uzas la malagrabraĵojn rilate al la politiko kaj aliaj nekonvenaj temoj, redonas al ni la plezuron ne nur legi, kiel atendi la venontan numeron. Regule ĝin sendas al mi, mia amikino, Nazaré Laroca, kies poemoj brilas nun tutmonde, dank' al nia kora lingvo...

Ĝis

Dirce Sales - Brazilo



Karaj,
de longe mi deziras gratuli vin pro via tre riĉa kaj tre interesa revuo "Turka Stelo". Krome mi deziras danki al vi pro via malavara regule dissendo al ni ĉiuj de via informo-bulteno. Estas ja granda oportuno por mi ekscii iom pli multe pri tiu ĉi mondparto sufiĉe malproksima de ni.

Maria Grazia.- Italujo

"Mirinda Lvivo" 2017 E-renkontiĝo

Ankaŭ la ĉi-jara internacia e-perfektigejo "Mirinda Lvivo" estis, kiel ĉiam, plensukcesa.

Kiel antaŭe, duono estis alilandanoj: el Germanio, Pollando, Rumanio ktp.

La aĝo de la partoprenintoj estis de infanoj ĝis pensiuloj. La meza aĝo estis 40 jaroj.

Fakte estis la sama kvanto de viroj kaj virinoj.

Nur unufoje ni ekskursis per turista buseto. Ĉujn aliajn tagojn ni senpage vojaĝis al aliaj urbetoj, rokoj, akvofaloj ktp per aŭtomobiloj. Ankaŭ ĉiuj ekskursoj certe estis tute senpagaj, ĉar gvidis ilin esperantistoj.

Ni turismis laŭ Lviva kaj Ivano-Frankivska provincoj. En urbo Lvivo nin interesis belegaj malnovaj stratoj, muzeoj, kafejoj (intercetero en unu kafejo nin mirigis 2-metraj flamoj sur la tabloj de la vizitintoj). Ĉi-jare la komuna tagmanĝo kun Ivivanoj okazis en unika loko -- en botanika ĝardeno, la scienca parto.

Ĉiu partopreninto ricevis mapon de la urbo, la surpaperan precizan programon (en la retejo dum la jaro eblis legi ĉiujn informojn pri la aranĝo) ktp kaj alilandanoj ricevis ankaŭ grandan aron de diversdimensiaj kalendaroj (ankaŭ surmuraj) pri Ukrainio, Kijivo, multajn faldfoliojn kaj bildkartojn pri Lvivo, Kijivo.

Ni loĝis en tre bela tamen malmultekosta hotelo, de



la balkonoj videblis arbarkovritaj montetoj. La aero estis tre pura, tre agrabla. Ni havis eblecon elekti laŭplaĉajn bongustajn malmultekostajn manĝaĵojn en kelkaj belaspektaj najbaraj kafejoj.

En la unua tago de la aranĝo estis kvazaŭ somere varmege, eblis sunbruniĝi. Poste la vetero estis pli simila al printempa. Dum unu el ekskursoj sur alta monto ni vidis-tuŝis neĝon! Do ankaŭ vintron ni 'renkontis' dum la aranĝo "Mirinda Lvivo".

La partoprenintoj perfektigis siajn e-kapablojn en du diversnivelaĵoj kursoj. Dank' al la granda antaŭa helpo de Andreo Jankovskij, en unu el la lecionoj kiujn gvidis mi, estis okazigita interesa konkurso.

En la antaŭaj jaroj mi venigadis po 4 miajn lernantojn al la internacia e-perfektigejo "Mirinda Lvivo".



Ĝi-jare -- 3,5 (ĉar unu estis infano, kiu tamen rapide lernis dank' al bona juna memorkapablo).

Kiel ĉiam, miaj lernantoj estis tre aktivaj en la aranĝo. La plej granda ilia programero estis koncerto de unikaj diverskontinentaj muzikaj instrumentoj -- de antikvaj ĝis modernaj. Ĉiuj aŭskultis la muzikon kaj povis mem ludi la muzikajn instrumentojn, ni eĉ organizis improvizitan orkestron. (Antaŭ la forveturo al la aranĝo, dum la lasta semajno de aprilo, miaj lernantoj vizitis ĉiutage senpagajn koncertojn de la plej

bona ukraina ĥoro nome de Verjovka, de simfoniaj orkestroj, operojn, tio estis parto de nia prepariĝo).

La programo de "Mirinda Lviv" estis tre riĉenhava, por ĉiu gusto. En la tre streĉa programo sufiĉis por ĉiuj lingvoperfektiĝo, turismado, okupiĝo pri arto, amikaj konversacioj ktp. Al miaj lernantoj tiom plaĉas ĉi tiu aranĝo ke ili volas eĉ pli multe da programeroj prepari por la sekvanta jaro. Pro tio, ke "Mirinda Lviv" estas internacia perfektigcela e-aranĝo, ĉiuj, memkompreneble, parolis nur en esperanto kaj tio certe tre helpis perfektigi. Speciale la komencantoj

dank' al la ĉiama esperanto ricevis grandan progreson.

Miaj lernantoj tiom plaĉis al ĉiuj, ke eĉ ili ĉiuj ricevis inviton por SENPAGA RIPOZO EN RUMANIO! Ili estas tre ĝojaj.

Svitlana Pohorila

Fonto: el la facebook-grupo Lviva Esperanto Gazeto.

<https://www.facebook.com/groups/802334296564118/permalink/1016311511833061/>

Efika Komunikado por Junularo



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estis fondita en Nederlando en la jaro 1938, per junuloj kiuj parolas Esperanton. Ĝi havas landajn seksiojn en diversaj landoj tra la mondo. La centra oficejo estas en Roterdamo. TEJO estas aktiva membro de Eŭropa Junulara Forumo kaj ankaŭ estas reprezentata en la Junulara Konsilantaro de Eŭropa Konsilio.

Inter la agadoj de TEJO estas plifortigo de internacia komunikado kaj interkultura interŝanĝo tra la internacia lingvo. TEJO antaŭenigas la junulojn por evoluigi iliajn kapablojn kaj kompetencojn sendepende de religio, raso, lingvo por ke ili ludu aktivan rolon en la konstruado de la komunumo. Kun tio celo, ĝi havas Erasmus+ projektojn por evoluigi la kapablojn de laboristoj en junularaj organizoj. Estas KA2 Erasmus+ projekto, kiu estas subtenita de la Nederlanda Nacia Agentejo. TEJO estas la kunordiganta organizo. Ĝi kunlaboras kun Esperantistaj Organizo en aliaj landoj por tiu projekto. Ĝiaj partneroj estas: Verdaj Skoltoj en Belgio, SKEJ en Slovakio, Nitobe en Italujo, HEJS en Hispanio, Cosmo en Britujo. La celo de la projekto estas trovi solvojn por la manko de kapabloj de NRO laboristoj. Oni preparos retbazitajn ilojn, kiuj estos uzataj de ĉiuj NRO laboristoj por evoluigi iliajn kapablojn.

Transnaciaj renkontiĝoj de la projekto kiuj okazis ĝis nun:

- La 1-a okazis en Delft, Nederlando inter la 28-a kaj 30-a de oktobro 2016, en kiu partoprenis 12 homoj (du reprezentantoj po partnero).
- La 2-a okazis en Amougies, Belgio, inter la 24-a kaj 26-a de marto 2017.
- La 3-a okazis en Teruel, Hispanio inter la 26-a kaj 27-a de Junio 2017.

Fatma Eroĝlan, Turkujo

Dum tiuj renkontiĝoj ni diskutis la necesajn kapablojn por NRO laboristoj kaj ni enfokusiĝis sur la plej gravaj kvar kapabloj:

- 1) Kiel paroli kun diversaj aŭdiencoj (aĝogrupoj, personecoj ktp)
- 2) Kiel varbi/vendi ideojn,
- 3) Kiel organizi kampajnojn (ekzemple konsciigo kampajno),
- 4) La diversaj kanaloj por interkomunikiĝi kaj kiel uzi ilin.

Nun, ni kreas materialojn por tiuj temoj kaj kapabloj, kiujn ni prezentos ilin en retbazitailujo.

La multobliga evento okazos en Slovakio en septembro. Tie, ni prezentos la projekton, la materialojn kaj la retbazitajn ilojn. Se vi sciivolemas pri nia projekto, vi povas sekvi nin pere de la facebook-paĝo de la projekto (**Projekto ECV**).

Por la multobliga evento, ni havos partoprenantojn el malsamaj landoj. TEJO pagos por vojaĝkostoj, manĝado, loĝado ktp kompreneble laŭ la limo de la projekta buĝeto. Ni alvokos partoprenantojn sur tiu facebook-paĝo. Sekvu nin sur facebook-paĝo de TEJO (**TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**) por ke vi kandidatiĝu por la evento.



Esperanto fariĝis 130 jaraĝa en la 26-an de julio



Esperanto fariĝis 130 jaraĝa en la 26-a de julio ĉijare. Kaj tio estis festata en la 102-a UK en Seulo. La 26-a de julio estas la tago kiam aperis la "Unua Libro" en la jaro 1887.

"Unua Libro" estas konvencia nomo de la unua lernolibro de "Lingvo Internacia", nuntempe nomata "Esperanto". Ĝin verkis L. L. Zamenhof sub la kaŝnomo D-ro Esperanto. La libro havas la indikon, ke la cara cenzuro aprobis ĝin la 21-an de majo de 1887



(laŭ la rusa Julia kalendaro, t.e. la 2-an de junio laŭ la Gregoria). La dua aprobo de la rusa cenzuro kun la permeso de disvastigo post la presado, portas la daton de la 26-a de julio (laŭ Gregoria kalendaro; 14-a de julio laŭ la rusa Julia kalendaro)[1]; tiun daton oni ĝenerale

konsideras kiel aperdaton. Ĝi estas festata kiel naskiĝtago de Esperanto.

La originala nomo de la verko, en la rusa lingvo, estas "Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ." (Mejdunarodnij jazik. Predislovie i polnij učebnik., Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro.), sed en priskriboj de la historio de Esperanto oni kutime nomas ĝin "Unua Libro". Al la naskiĝo de tiu kromnomo certe kontribuis posta verko efektive titolita "Dua Libro" de l' Lingvo Internacia (1888). Oni uzas la nomon Unua Libro por ĉiuj lingvoversioj kaj ĉiuj eldonoj de la verko.

La originala eldono estis nur ruslingva, sed antaŭ la fino de 1887 la libro aperis ankaŭ en la pola, germana kaj franca lingvoj kaj duaeldone en la rusa. La unua angla versio aperis en 1888, fuŝe tradukita, kaj laŭrakonte Zamenhof mem haltigis ĝian vendadon, kiam Richard H. Geoghegan, irlandano loĝanta en Britio, retradukis la libron.



Antaŭ la fino de 1888, la "Dua Libro" kaj la "Aldono al la Dua Libro" eldoniĝis. En 1889 la Unua Libro estis tradukita en la hebrean.

La libro konsistas el 40 paĝoj, kovrilo kaj granda folio. Ĝia enhavo konsistas el:

- Antaŭparolo (28 paĝoj), en kiu estis la unuaj Esperanto-tekstoj:
- Patro nia, preĝo
- el la Biblio
- Letero, modelo de korespondaĵo
- Mia penso, originala poeziaĵo
- El Heine', poeziaĵo de Heinrich Heine el la Libro de Kantoj (Buch der Lieder), tradukita el la germana
- Ho, mia kor', originala poeziaĵo
- Promeso, ok samtitolaj slipetoj por subskribi kaj tiel promesi ellerni la lingvon, se dek milionoj da personoj donis publike la saman promeson
- Plena lernolibro de la Internacia Lingvo, 6-paĝa, konsistanta el prezento de la alfabeto kaj dek ses gramatikaj reguloj;
- Internacia-rusa vortaro (sur aparta folio) kun jena enkonduka frazo (ruse): "Ĉion, kio estas skribita en la internacia lingvo, oni povas kompreni per helpo de tiu ĉi vortaro".

Fonto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Unua_Libro






— la viv-konsilo el japana ĵurnalo —
Por dialogo transnacia

Jen la sekvanta estas viv-konsilo el japana ĵurnalo. Ĉu tia ĉagreno estas ankaŭ en Turkio? Ni pripensu transnacie, kio estas feliĉo?

(Demando)

Mi kun okdek jaraĝoj, nun ne povas piediri post la operacio de kancero, kaj mi ĉiutage nur restas en lito. Kiel malĝoja mi estas!



Mia edzo mortis antaŭ pli ol dudek jaroj kaj mi loĝas kune kun la familio de mia unua filo. Tamen mi

postvivas mian edzon pro lia sufiĉe da pensio, kies parton mi povas doni al miaj genepoj kiel la poŝmonon.

La unua filo kun la aĝo de kvindek jaroj tuj riproĉas min kolereme dum interkomunikado, pro kio ofte okazas kvereloj inter ni. Lastatempe li neniam envenas en mian ĉambron. Do, por forpeli la izolecon mi iras en la komunan ĉambron de miaj familianoj. Sed neniu alparolas min. Tial mi televidas sencele en la ĉambro. Televidilo estas mia sola amiko.

Kvankam mia malpliĝa frato loĝas najbare, li neniam vizitas min. Mi ankaŭ havas la duan filon sed li kaj lia edzino malofte vizitas min, ĉu pro sinĝeno al sia pliĝa frato. Mi nun komprenas, ke tio sekvis el mia aroganta agado. Sed, kiel mi povas amikiĝi kun ili?

Nun mi sentas min tiom izolita, ke mi malkovras tion nur al miaj amikinoj per telefono kontraŭ mia honto. Kiel soleca mi estas! Helpu min kaj donu al mi saĝan konsilon de vi!

(Konsilo)

Spite la okdek jaraĝojn, lastatempe vi estis operaciita je kancero. Ŝiras al mi la koron viaj vortoj tiel ripetitaj: “Mi estas ege soleca”. Mi estas samaĝa kun vi, sed mi estas en la stato pli soleca ol vi.

Mi havas nur unu filinon, kiu fariĝas tuj kolerema al mi same kiel via unua filo. Mi ne havas eĉ ĝojon doni poŝmonon al genepoj, ĉar ilin mi ne havas. Mi vivadas sola sen miaj gefratoj, kiuj jam mortis en la infaneco. Do, mi ne havas miajn genepojn kiel vi.

Antaŭ kvin jaroj mi estis operaciita je grava sangvazo. Nun, miaj koro kaj pulmo funkcias nur 60% kompare kun tiu de samaĝuloj.

Pardonu min kalkuli viajn mem posedaĵojn; suffice da pensio, du filojn, genepojn, kunloĝantajn familianojn de via unua filo kaj la malpliĝan fraton najbare loĝantan. Kiel enviinda vi estas! Vi devas akcepti viajn mem solecon kaj izolitecon en la familio kiel vian fatalon.

Mi konsilas al vi, ke vi skribu al viaj malpliĝa frato kaj dua filo la leteron kun kara amemo kaj ankaŭ la mesaĝon ĉiujare al viaj filoj okaze de ilia naskotago. Se vi deziras sole esti amata, via deziro ne estos favorata.

Kaj estas prava afero, ke preskaŭ ĉiu oldulo, proksimiĝanta al la morto, sentas sin soleca. Sed ni komprenu la aktualecon, ke tia homo, kia elkore bedaŭrita ĉe morto, vivadis kun amo al siaj familianoj kaj konatoj. Al mi ŝajnas, ke vi volas pli longe vivadi, ĉu ne?

Homa feliĉo dependus de diversaj faktoroj: medio familia kaj geografia, riĉeco, saneco, edukiĝo ktp. Krom tiaj faktoroj estas pli grave trovi sian propran rolon kiel ne en komparo kun aliaj sed en diverseco. Kiam oni trovis sian rolon bezonatan de aliaj, tiam oni sentas sin feliĉa, kio gvidos al sia vivĝojo.

En Japanio estas kutimo adori ĉiajn ekzistaĵojn en naturo (=animismo¹). Ĉiu estas bezonata en la mondo kaj havas rolon kiel harmonia ekzistaĵo por pace vivadi unu la alian. Japanoj nomas tiujn ekzistaĵojn “dio”, eble la infanoj de ĉiopova “Dio”. Dio donadas malavare kaj egale al ĉiuj vivaĵoj la plej bezonatajn por ilia baza vivado, (ekz-e; akvo, aero, lumo, ktp) sed nenion postulas kontraŭ tio. Oni nomus tiun agon “amo”. Sed preskaŭ ĉiuj homoj ne povas rimarki sian rolon kiel unu dio el dioj en la mondo dum la tuta vivo. Saĝa homo eble povas rimarki sian rolon bezonatan fare de komunikiĝo kaj kontaktoj kun diversaj kulturoj. En Japanio estas maksimumo: Kiam oni trovis sian propran rolon bezonatan en la mondo, tiam oni povas tuj fariĝi Dio. Fermita ekzistaĵo kun soleco neniam kondukos ĉagrenon al feliĉo, mi pensas. Kiel vi pensas pri tio?

PIV

¹ **animismo** Θ Formo de religio, bazita sur la kredo, ke ĉiuj objektoj en la mondo havas propran animon, ligitan aŭ ne al ili.



En tiu tago mi estis en mia kutima laborejo, Queen strato Hakim Optiko, en la unua servo-tablo ĵus post la enirejo.

La homon, kiun mi salutis per mia kutima rideto (Ĉu ĝi estis honesta?

Laŭ mi lia rideto estis pli sincera ol la mia), estis blankhara, kutima kliento. Sur sia ĝinzo kies koloro estis heliĝinta, li alportis t-ĉemizon kies vera koloro estis nigra sed ĝi tiam aspektis griza. Liajn ŝuojn mi eĉ ne vidis.

“Mi havas malgrandan problemon” li diris, kaj etendante malgrandan nigran ingon al mi, li malfermis ĝin. Li elmontris sunokulvitrojn kiuj estis nespecialaj, sen markaj, kaj malmultekostaj. Ĉar la dekstra ŝraŭbeto estis falinta la okulvitroj kaj ĝia dekstra tigo estis apartaj.

“Ha, nenio grava ĝi estas” mi diris. “Nur du minutoj...”

Prenante la okulvitrojn mi min direktis al la teĥnika parto en la malantaŭo de la magazeno.

Kiam mi revenis la dekstra ŝraŭbeto estis en sia loko, kaj la alia ankaŭ estis streĉita. Mi viŝis la vitrojn, kaj etendante ilin mi diris “sunbrilajn tagojn mi deziras al vi”.

Li demandis sian ŝuldon. Li estis sincera.

Mi ridis, “nenio” mi diris.

Li haltis. Li rigardis en miaj okuloj. Post momento li kun sia sincera rideto demandis al mi, “ĉu floro aŭ papilio?”

Ne povinte pensi sufiĉe pri la demando por ke mi komprenu ĝian signifon, mi diris “papilio”.

Li remetis la malgrandan ingon, en kiu li metis la okulvitrojn, en sia poŝo kaj diris “donu al mi viajn

manojn mia knabino”.

Li etendis siajn manojn super la tablo kaj prenis la miajn, li ilin iomete altiris al sin kaj kunmetis ilin kune en siaj manoj. Li momente restis tiel.

Poste li turnis sin kaj eliris.

Ĉu mi mem malfermis miajn manojn pro konfuzo, aŭ ĉu ili memmalfermiĝis, mi ne scias.

El miaj manoj, malrapide elflugis papilio, kiu estis granda nur kiel la najlo de mia dika fingro. Ĝi ne forflugis, ĝi estis kunfrapanta siajn flugilojn kaj ŝvebanta en la aero antaŭ mi, kvazaŭ nur por mia ĝuado. Ĝi estis la plej bela papilio, kun la plej brilbuntaj flugiloj, mi iam ajn vidis.

Miaj okuloj kaj buŝo devis esti ege mafermitaj pro mia konfuzo. Mi mire restis tiel, rigardanta al la briletojn kiuj elŝprucis el ĝiaj flugiloj, ĝis tiam, kiam ĝi malaperis. Sed mi povus resti tiel, rigardanta al ĝi ĝiseterne.

Mi nun pensas, ke la tempodaŭro devis esti “nur du minutoj”...

Verkis: **Haluk Mesci**

Tradukis el la turka: **Vasil Kadifeli**



Destino

Maria Nazaré Laroça, Brazilo



Kaj ĝi kreskis suverena en tiu doma ĝardeno, kun malfermitaj brakoj al la ĉielo el ĉiuj koloroj kaj humoroj. Larĝa folioplena hararo, ornamita per veluraj floroj rozkoloraj. Jen diskreta eleganteco kaj pacienco.

Subite la domo fariĝis trista amaso da skombroj kaj polvo. Kortuŝita antaŭ la senkulpeco de l' arbo atendanta morton, mi preskaŭ ploris. Ĝi plenumis sian destinon kun digno. Kaj mi nenion povis fari.

Do naiva ideo venis al mi en la kapon: mi petis de la tiea prizorganta laboristo, ke li donu al mi floran branĉon. Kaj tenere tenante tiun branĉon preskaŭ je mia grando, mi supreniris sur la straton ĝis la placo, kie matene mi ŝatas promeni.

Por mia ĝojo, la ĝardenisto promesis al mi planti ĝin inter la aliaj arboj en la placo. Do mia koro malpeziĝis. Mi esperas vivi por povi akompani la renaskiĝon de mia malnova amiko.

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com.tr/2017/06/destino.html>



Al mia nekonata avo

Al mia nekonata avo

Forrabis vin kruela mondmilito,
La sort' ne lasis morti vin en lito;
Legema muelisto, mia avo,
Pereis malproksime, en batalo.



Ie, sub bataalkampo herbkovrita
Vi kuŝas nun, de ĉiuj forgesita;
Mi serĉas, sed ne trovas vian spuron,
Ne eblas trapenetri la Mallumon.

Kio instigas min al la serĉado,
Ĉu venas de ie la voko de avo,
Ĉu el spirita mondo li alvokas
Kaj al nepino mesaĝon transdonas?

Kio, do, povus esti la mesaĝo
En la milito de l' falinta avo?
El lia tombo voĉo al mi sonas:
Nenio, ol la paco, pli valoras.

Lenke Szász, Rumanio

Mia avo pereis en 1915. La tradukon "La triĝiba monto" mi dediĉis al lia memoro

"**Triĝiba monto**" estas libro de Ferenc Szemlér, kiun tradukis al Esperanto Lenke Szász.

La temp de la libro estas pri Sikula familio, kiu vojaĝas al/de Adriatiko ĉirkaŭ la komenco de la unua mondmilito.

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9096>



Homoj, kiuj ŝatas katojn...



Homoj, kiuj ŝatas katojn, evitas fortorilatojn. Ili malŝatas ordoni, kaj timas tiujn, kiuj laŭte parolas, kaj skandale koleras. Ili revon mirindan tenas pri mondo de kvieto kaj mildo, kie ĉiuj kune vivus harmonie. Ili deziras povi esti tion, kion ili estas,

de neniu riproĉataj.

Homoj, kiuj ŝatas katojn lertas pri fuĝi konfliktojn, kaj tre malbone sin defendas kiam agresitaj. Al ili pli plaĉas silenti, eĉ se ili tial ŝajnas malkuraĝaj. Ili havas emon al enmemiĝo, al sindediĉo; Ili fidelas je infanrevoj, kiujn ili ne aŭdacas riveli al iu ajn. Ili tute ne timas silenton.

Homoj, kiuj ŝatas katojn, ŝategas ties sendependon, ĉar tio garantias same al ili la propran liberon. Ili maleltenas katenojn, nek por si nek por aliuloj. Kaj nature revas, ke amo estu memkomprenebla, sen klopodo, kaj ke ilin oni neniam forlasu. Ili malŝatas akiri la aĵojn per trudo, kaj deziras, ke ĉio estu donita.

Homoj, kiuj ŝatas katojn, kun senlima respekto kaj tener', ŝatus esti amataj en sama manier' – ke oni taksu ilin belaj kaj molaj, ĉiam, ke oni ilin ofte karesu, ke oni ilin akceptu tiaj, kiaj ili estas.

Esperantigis Roland Platteau, Francio

Homoj, kiuj ŝatas katojn fidas, foje tro forte, je intuicio, instinkto pli precipas ol pripenso. Ili emas al l'neracia, al okultaj sciencoj. Ili kiel plej alte taksas la unuopulon kaj ties kvalitoj personaj. Se iliaj konvinkoj igas ilin sindevontigi, parto de ili ĉiam restas observanta, ĉiam preta al retroto en sian intiman kaj idean teritorion, konstante sur rando, same kiel siaj kunbestoj, inter pakto kun socio, kaj reveno en la sovaĝa vivo memmensa.

Homoj, kiuj ŝatas katojn ofte estas fornosidaj. Ili bezonegas esti konsolataj. Pri ĉio. Ili ŝajnas esti plenkreskuloj, sed sekrete tenas deziron ne kreski. Ili domaĝas ĵaluze sian infanecon, kaj en ĝi forkuras sekrete malantaŭ siajn duonfermitaj palpebroj, kun kato surgenue.

Verkis: **Annie Duperey**, la Hazardaj Katoj
Esperantigis **Roland PLATTEAU** 7 marto 2007



La mekanismo de Antikiteroj

Spiros Sarafian, Grekujo



Je la mezo de la helena maro, etendiĝante inter Peloponezo kaj Kreto, sur la ŝipdirekto kondukanta al Italio kaj la cetera Eŭropo, estas malgranda insulo, akompanata de kelkaj rokinsuletoj, nomata Antikiteroj (Αντικύθηρα / Antikythera), kaj konata al la antikvaj latinaj maristoj ankaŭ kun la nomo Cirigoto.

Unu el la multegaj helenaj insuloj, tamen tute izolita kaj pri nenio interesa aŭ signifa, estis kompreneble ne vaste konata kaj ne alloga al vizitantoj; ĝi ĝuis nur la malmuntajn siajn loĝantojn kaj sporadajn alproksimiĝojn de nelokaj fiŝistoj kaj ĉiaspecaj trapasantaj ŝipoj.



Tio daŭris jarmilojn, ĝis la jaro 1900, kiam fiŝistoj-spongokolektistoj el la insulo Simo, revenante de Afriko, devige atingis la insulon kaj tie ankris por eviti for-tan marondiĝon.

La 17an de Majo de tiu jaro, tiuj spongokolektistoj decidis esplori la nekonatan al ili marfundon, por ebla trovo de spongoj. Kiel spertaj spongokolektistoj lerte kaj facile subakviĝis profunden, ĝis kiam, en profundo de preskaŭ 60 metroj, surprizite ekdistingis alfundiĝintan antikvan, tre grandan ŝipon. Tiele, tiuj spongokolektistoj, tute hazarde iĝis la eltrovintoj de unika, netakseble valora arkeologia trezoro kaj post tio la nekonata, modesta insulo iĝis rimarkinda kaj ĝia senfama nomo iĝis kaj restos por ĉiam konata en la tuta mondo, precipe en la scienca mondo!

Studinte la trovitajn sur la ruinoj kaj diversaj objektoj helenajn surskribojn, la monerojn kaj aliajn trovaĵojn, la fakuloj konkludis, ke la ŝipo estis droninta inter la jaroj 87 kaj 63 a.K., do, preskaŭ 2000 jarojn antaŭ ties eltrovo.

La enmara arkeologia prifosado daŭris longe kaj estis

eltiritaj el la maro valoraj eltrovaĵoj, la plimulto el kiuj estas elmontrata en la arkeologia muzeo de Ateno. Inter multo alia estas la mondkonata marmora statuo nomita “Adoleskulo de Antikiteroj”, alia, nomita “Filozofo de Antikiteroj”, estis multaj marmoraj kaj kupraj objektoj, amforoj, ĉiaspecaj ujoj, muzikinstrumentoj, diversaj uzaĵoj k.a.

Tamen, tio kio igis tiun aferon unika, estas la eltrovo de la “Mekanismo de Antikiteroj”, konata al la mondo de la sciencistoj kun la internacia nomo “Antikythera Mekanism”, objekto kiu renversis ĉion kion la sciencistoj kredis ĝis tiam, kaj kiu montris ke la antikvhelena teknologio estis antaŭ miloj da jaroj atinginta la hodiaŭajn sciojn.

Temas pri metala, kupra aŭ latuna, portebla astronomia instrumento, tiom komplika, ke, post 100jara daŭra studado, ĝia funkcio ne estas ankoraŭ tute ekplukita. Laŭ la specialistoj el la tuta mondo, kiuj senĉese okupiĝas pri ĝi, tiu instrumento estas la unua komputa (analogo) komputilo, nome la “laptopo” de la antikveco.

La mekanismo estis probable metita en skatolo kun dimensioj 30X20X10 centimetroj, kiu havis flanken du internajn, protektajn bronzajn platojn, kiuj estis plenaj je uzindikoj, abundo da gravuritaj surskriboj. Ĝis nun, helpe de la plej novaj kemiaj kaj aliaj metodoj, estas malkovritaj, klare legeblaj, preskaŭ 1200 cizelitaj literoj de la helena alfabeto, kiuj kompreneble formas vortojn kaj prepoziciojn koncernantajn astronomiajn, geografiajn kaj teknikajn terminojn. La alto de ĉiu litero estas plejparte 2,17 milimetroj, afero kiu montras ke ili estis gravuritaj per ege maldikaj iloj.



Per tiu miriga mekanismo la antikvaj uzantoj, versajne specialaj sciencistoj, povis observadi la vojon de Suno kaj Luno tra la zodiako. Per certa manipulado de la multaj indikatoroj, dentaĵoj, komplika dentoaro, kies partoj, turniĝante, kunmavis samtempe unu aŭ pli multajn ankoraŭ montrilojn, oni povis scii ĉiun momenton la pozicion de la planedoj, oni povis kalkuli

la daton de venonta suna aŭ luna eklipso, oni povis fari ĉian astronomian kalkulon kaj observadon de la kosmaj fenomenoj.

La Mekanismo de Antikiteroj estas objekto de daŭra studado kaj esplorado por la plej distingindaj fakuloj, famaj astronomoj kaj aliaj specialaj sciencistoj de la tuta mondo, kelkaj el kiuj jam provis, sed ne tute sukcesis fari imitaĵojn de la mekanismo, malgraŭ ke ili

uzis la plej novajn teknologiajn metodojn kaj ilojn.

Grupo el tiaj fakuloj estis kreinta la retpaĝon: <http://www.antikythera-mechanism.gr> en kiu interesiĝantoj, povas trovi detalajn, certe ĝustajn informojn, kompreneble pli bonajn ol la miaj.

Verkis **Spiros Sarafian**

西安 Ŝi An (Xian laŭ ĉina)

Post dek tri horoj vojaĝo sur la trajno (sen lito dum nokto), finfine mi kaj mia edzino estus en Ŝi An ĉefurbo de Ŝanŝi regiono (Shaanxi). Certe nun ekzistas rapida trajno inter Pekino kaj Ŝi An kaj atingas nur en kvar horoj sed la kosto estas sama kiel oni uzi aviadilo.



Xian la plej grava antikva ĉefurbo de Ĉinio troviĝas en centro de lando fakte por nuna epoko oni povas diri ke troviĝas en fino de civilizacio kial post Xian ekzistas nenio... dezertoj... Tibeto... grandegaj regiono... kie neniam venis... kie neniu komprenis la grandegan evoluon de orientaj urboj... Xian antikva tutmonda kultura kaj financa centro, nun estas la limo... tiu, kiu volas vojaĝi pli okcidenten nepre devas pasi de ĉi tie kaj devas flugi de Xian... kiel malnove la silka vojo finiĝas kaj komencas de ĉi tie... En Xian jam vivas ses milionoj da homoj, ekzistas du linioj de metroo kaj fariĝos laŭ la programo sep linioj en tri aŭ kvar jaroj.

Ni reiris en 西安 antaŭ kvar jaroj en 2010 kaj vidis la plej gravajn antikvaĵojn... Sonorilo en centro... Terakotoj... antikva muzeo... budismaj sanktejoj... sed nun ni ne venis kiel turistoj... ni ne venis por vidi la urbo... sed ni venis por vidi esperantistan amikon: Wang Tianyi Chielismo, kiu estas prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF)... li havas en Xian unu grandan komercan oficejon kun dek oficistoj... sed interesa estas, ke ili uzas kiel laborlingvon nur Esperanton... tiel ni vizitis ilin... ni

Koros Lesvos, Grekujo

renkontiĝus unue al unu restoracio proksime al lia oficejo... tiu ĉi restoracio estis speciala pri makaronioj... la tuta Xian estas speciala pri tiu ĉi manĝaĵo... ili estas tuta freŝaj kaj manfaritaj... oni havas la eblecon vidi kiel ili faras la paston... kiel ili knedas ĝin... kiel donas la formon al makaronioj... ili estas ĉindevenaj makaronioj... la formo kaj la gusto estas tute malsimila al tiu de Italujo... italaj makaronioj estas tro simplaj... en Xian makaronioj estas arto... ili povas esti tre vastaj, tre maldikaj, dikaj, longaj... ili povas esti de tre diversaj gustoj... en via telero vi povas hani herbaj viandaj, spicaj... ĉio, kion oni povas imagi...

Chielismo diris ke li venos en la restoracio pli poste kun kelkaj de siaj amikoj, kiuj estis en Argentino... sed mi miskomprenis kaj opiniis ke ili estos de Argentino... mi kaj mia edzino atendis ilin en ĉi tiu restoracio kiu specialigas sur makaronioj... finfine Chielismo aperis kun du amikoj... ni salutis unu la alian kaj sidiĝis en unu granda tablo en la centro de la restoracio... sed unu de ili tute ne ŝajnis esti ĉino kaj mi opiniis ke li estis de Argentino... dum kelkaj minutoj mi havis ĉi tiun opinion... ĝis li komencis paroli...



Li estis de Gansu (loko pli norde de Shaanxi) kaj ne el Argentino sed li ĵus revenis el Argentino... lia mieno similis al homo de Suda Ameriko kaj ankoraŭ lia hararo estis tia... li tute ne similas al ĉinoj... lia esperanta nomo estis Trezoro, li estis komitato de

UEA... rapide venis la grandaj bovloj kun la specialaj makaronioj de Xian... tiel ni babilis iomete... poste ni iris al oficejo de Wang kun Trezoro kaj ankaŭ unu alia esperantisto el Pekino, kiu nun vivas en Xian kaj laboras kun Wang (li estas pensiulo kaj estis kun ni en la restoracio)... Wang montris al ni lian interesan oficejon, lian malgrandan Esperanto-bibliotekon, liajn oficistojn, kiuj parolas Esperanton kaj uzas ĝin por komerci en reala mondo... vere mirinda por mi... Wang estis tre ĝoja kaj parolema same ankaŭ estis Trezoro kaj ni parolis generale pri la Esperanto Movado... ili informis min, ke en Azio homoj pli multe kredas je la ideo de Esperanto ol homoj de Eŭropo, en iliaj cerboj ne ekzistis duboj aŭ pensoj kiel de Eŭropanoj... ili informis min, ke proksime de Xian en unu budhista monaĥejo unu monaĥo instruas Esperanton kaj oni povas resti tie por unu semajno, la tempodaŭro de la instruado... la nomo de tiu monaĥo estis Miaohui... mi trovis unu libro de Miaohui en la biblioteko de Wang... ĝi estis unu tradukaĵo de budhismaj rakontoj... "amo al vivo" estis la titolo de la libro, kiun li esperantigis... en ĝi estis cent mallongaj budhismaj rakontoj pri amo al bestoj kaj al la kriminala konduto de homoj... ĉio estas konektita en vivo... finfine Wang donacis tiun ĉi libron al mi... ni parolis longe kaj pasie kun Trezoro... venis ankaŭ unu fraŭlino, oficistino, kaj nia parolado ŝanĝis al komercado... ŝi demandis nin se mi konas ion pri la kerno de olivoj... ili serĉas grandajn kernojn kiun tre multe uzas ĉinaj artistoj... finfine post multaj horoj ni decidis foriri, unue ni prenis kelkajn fotojn kaj poste varme salutis nin unu oficisto el Brazilo, kiu laboras kun Wang... Wang ĉefe eksportadas al Brazilo...

Ili invitis nin al la monaĥejo kie instruas Miaohui, kie post unu semajno okazus Esperanto-konferenco kaj Trezoro proponis al mi, ke mi prezentu kaj parolu pri Grekio... sed la postan tagon ni devus foriri de Xian tro frue matene...

El la fenestro de nia hotel-ĉambro ni povis vidi la gravajn antikvajn murojn de la urbo kaj la belegan sonorilon en la centro de urbo...

Noktiĝis kaj la lumoj estingiĝis... pluvetis... la sonorilo estis pli bela dum la nokto...

La postan tagon ni foriris al la magia Loŭ Guan... ĉi tie loĝas la Ŝi Fu de mia edzino (spirita instruisto)... en Ĉinio ekzistas multaj specoj de Ŝi Fu, ne nur instruistoj pri spirito sed ankaŭ pri militaj teknikoj... sed en Loŭ Guan troviĝas la tombejo de Lao Zi eble la plej spirita

homo-de Azio...

La postan tagon ni reirus al la centro de Xian por revidi por la lastan fojon la sonorilon el pli proksime... ni estis en la hotelo... la pluvo plifortiĝis ... la sonorilo estis malfacile videbla pro la pluvo... finfine la pluvo haltis...sed je la deka horo oni fermis la lumojn de la muro kaj iom poste la lumojn de la sonorilo... la vetero similis aŭtuno kaj ne aŭgusto... ni devis dormi...

En miaj pensoj estis Wang kiu sukcesis fari tiom da gravaj aferoj kun Esperanto... li estis teknikisto kaj laboristo... li laborus dum dudek jarojn en fabriko ĝis li malkovris Esperanton kiu ŝanĝis sian tutan vivon... tiel kun tiuj pensoj mi endormiĝis senkompreni...

Ni vekiĝis tre frue, ni ne manĝis ion kaj iris rekte al la bus-haltejo por iri al Loŭ Guan... mi iris tien en la 2010 sed mi neniam imagis ke mi reirus en tiu ĉi profundan lokon de Ĉinio al tiu ĉi tre malgranda vilaĝo... tiam mi restis nur kelkaj horoj... nun mi ne scias kiom da tempo ni restos tie... antaŭe ni per buso iris la saman vojon en 5 horojn sed nun mi ne scias en kiom da horoj ni atingos Loŭ Guan...



...la sola afero, kiun mi konas, estas, ke Loŭ Guan ankoraŭ restas kiel unu vera spirita loko malgraŭ la epoko de mono, turismo, komerco ka de la ĉina financa evoluo... sed la demando estas... vere estus pli bone se ne ekzistus demando... por kiom da tempo ankoraŭ ĝi povos rezisti, kontraŭi la materiala evoluo... ni eniris la buson... la suno komencis reaperi... mi esperis ke poste aperos ankaŭ pli da sunradioj kaj la suno ne kaŝos sin malantaŭ la nuboj... same kiel miaj sentoj...

Tiun ĉi tekston mi verkis en Pekino en septembro de 2014...

Koros Lesvos (el Grekujo)

KIAM KAJ KIEL VI KONATIĜIS KUN LA LINGVO ESPERANTO?

Esperanto troviĝis en mia familio antaŭ mia naskiĝo. Tamen miaj gepatroj ne kreis de mi denaskan esperantiston. Mi renkontis kaj aŭdis esperantistojn dum mia infanaĝo, sed mi neniam parolis esperanton. Ĉiun dimanĉon vespere mi aŭdis miajn patron kaj onklon telefone inter si esperanton – ofte longajn interparoladojn. Tio fariĝis magia dimanĉvespera endormigilo.

Eble tio iel gvidis min survojen al Esperantio?



KIEL VI PRISKRIBUS AGADON DE VIAJ PARENCOJ EN ESPERANTIO?

En la gimnazio mia onklo renkontis instruiston, kiu estis fervora esperantisto. Kiel lia lernanto li interesiĝis kaj lernis esperanton en 1930-aj jaroj. Mia onklo, Olle Olsson, fariĝis en sia labora vivo instruisto kaj li ankaŭ multon instruis esperanton.

Li komencis instrui sian fraton, Nils Olsson (mia estonta patro) Dum la 30-aj jaroj esperanta lingvo kaj esperantaj ideoj vivis, multaj homoj interesiĝis, multaj lernis. Dum tiuj jaroj Tiberiu Morariu el Rumanio vizitis kaj loĝis en Svedio. Lia agado antaŭenpuŝis la intereson pri esperanto en la socio. Miaj patro kaj onklo kune kun interesita grupo fondis viglan esperantoklubon, kiu agis pri kursoj kaj turismo. Patro ofte interpretis prelegantojn el diversaj landoj antaŭ sveda publiko. Do mi naskiĝis en vivanta esperanta agado, sed ne parolis esperanton.

RAKONTU PRI PLEJ GRAVAJ ATINGOJ VIAJ!

Tio eble estas malfacila, ĉar ĉio estas kunigita kiel reto aŭ kunteksita per diversaj pecoj de ŝtofo. Miaj unuaj esperanto-paŝoj ekster la hejmo, ekster mia hejmloko, estis pasigi duonjaron en Gotenburgo. Mi laboris tie, sed ferioj kaj vesperoj estis tedaj. Mi eksciis pri tio, ke ekzistis esperantoklubo en

Gotenburgo. Mi iris tien, eksciis, ke en la urbo estas kelkaj gejunuloj, infanoj de esperantistoj. Ni renkontiĝis kaj kune eklernis esperanton, vagadis, dancis, faris vojaĝon al junulara esperanto grupo en Jutlando (en Danlando, proksime al Gotenburgo) Jam mi ekŝatis la vivon en Esperantio. Mi partoprenis kaj en la klubo por plenkreskuloj kaj en la eta junulara klubo.

Tempo venis por partopreni en TEJO-kongresoj. Tie mi aperis kun magra kono en la lingvo, sed renkontis junajn personojn, kiuj bone parolis. Mi estis kun tiuj junuloj, kiuj gajnis la oratoran konkurson. Mi aŭskultis, aŭskultadis, memoris, lernis. La unua "atingo" eble ne estis atingo, sed donaco. Ekde miaj unuaj paŝoj en Esperantio mi havis la bonŝancon renkonti korajn kaj bone parolantajn esperantistojn de kiuj mi multon lernis. Mi ofte lernis kiel infano per aŭskultado. Mi mencias kelkajn nomojn el inter miaj bonaj geamikoj, al kiuj mi multe aŭskultis kaj de kiuj mi multe lernis.

Egon Starup-Jensen, Maurice Sujet, Jadwiga Gibczynska, Zofia kaj Jerzy Fornal, Raita Pyhälä/Saliko kaj multaj aliaj. Mi rekomendas al ĉiuj novaj esperanto-parolantoj serĉi bonajn kunparolantojn. (ekz en Ekparolu en edukado.net).

Alia ebla "atingo" estas, ke mi post forta persvado "gvidis" Lars Forsman al esperanto-kurso. Li dum 15 jaroj vidis la faman internacian esperantokurson en Karlskoga popolaltlernejo. Li verkis plurajn lernolibrojn kaj libron pri sia laboro en Karlskoga.

Tria afero estas, ke mi organizis turneojn en Svedio por la famaj aktoroj Jadwiga Gibczynska kaj Jerzy Fornal kaj por pluraj prelegantoj, kiuj parolis pri diversaj temoj kaj mi interpretis ilin ofte antaŭ publikoj en lernejoj. Tion mi faris dum 12 jaroj en la nomo de SEF (Sveda Esperanto Federacio). Mi kun la klubo en Oskarshamn organizis SEF-kongreson (125 partoprenantoj) kun dekpersona grupo el Estonio (komence de la 1990-aj jaroj). Ni nomis ĝin kultura kongreso. Tri artistoj esperantaj el tri landoj ekspoziciis, la aktoro Jerzy Fornal prezentis teatraĵon "Vagabondo" de Harold Brown, Zofia Fornalowa kaj Hans-Gunther Krause prelegis, Ĵormar kaj Nataŝa kantis por la unua fojo en Svedio, la estona grupo kantis kaj rakontis. La artaĵoj estis montritaj en tri diverslokaj bibliotekoj. Jerzy Fornal mimprezentis en lernejo por etaj infanoj. Aperis artikoloj en la lokaj gazetoj kaj radio.

Dum multaj jaroj mi gvidis esperanto-kursojn en la kadro de studorganizo. Kelkaj el la lernantoj trairis la malsupran ekzamenon kaj akceptis gastojn el Pollando.

Mi tradukis du librojn de Astrid Lindgren, "Emilo de Smolando" kaj "Fratoj Leonkoro". Pro tio mi povis prelegi pri "La Verkoj de Astrid Lindgren" en pluraj landoj eŭropaj kaj dum kelkaj semajnoj en Japanio. Harold Brown kaj mi havis etan eldonejon, kiu eldonis la AL-librojn kaj plurajn aliajn libretojn kaj kajerojn. La nomo de la eldonejo estas "Ulekso".

Mi gvidis kelkajn grupvojaĝojn al esperanto renkontiĝoj. Dum la unua mi estis nur 20-jara. Busvojaĝo al Budapeŝta kongreso 1983. En la 1990-aj jaroj mi gvidis dekpersonajn vojaĝojn al Tomsk en Siberio, kaj plurajn tiajn grupojn al Estonio. En tiuj grupoj estis ankaŭ kelkaj neesperantoparolantoj. Ili multe laŭdis tion, kion povas esperanto aldoni al vojaĝo. Ni loĝis en privataj hejmoj (ĉiam esp + ne-esp). Kunlaboris kun Elsbeth Bormann pri "Virina agado". En ĝi partoprenis svedaj politikistoj el ĉiuj politikaj partioj tiam en Svedio. Audry Childs-Mee gvidis esp-kurson por ili.

Sed plej grave estas kompreneble ĉiuj renkontiĝoj kun bonaj geamikoj – multaj "ĝis la morto disigis nin".

LA DIFERENCO DE ESPERANTOMOVADO NUN KAJ IAM.

Eble nia generacio naskita en 30- 40- 50-aj jaroj ne sufiĉe zorgis pri niaj postsekvantoj, ne sufiĉe zorgis pri krei niajn posteulojn. Eble niaj "infanoj" ne aŭskultis kaj sekvis siajn "gepatrojn", kiel ni antaŭe faris. Eble la

gejunuloj post ni estis pli liberaj trovi propran vojon.

Sed povas ankaŭ esti, ke rete estas vigla esperantovivo, pri kio ni ne sufiĉe scias. La plej grava en esperantomondo estas kunlaboro, internaciaj kontaktoj. Kiam la mondo fariĝas pli internacia, kial nia internacia ideo ne pli floras kaj evoluas?



Intervjuis **Raita Pyhälä** (en la maldekstra)

-- **Kerstin Rohdin** (en la dekstra kun ruĝa ĉemizo) estas sveda esperantistino kiu 80-jariĝis en majo 2017. Mi trovas ŝian E-vivon interesan kaj imponan: ŝi estis bona organizanto, eldonis librojn, tradukis du infanlibrojn de Astrid Lindgren, kiuj estas sufiĉe konataj kaj aperis ankaŭ en dekoj da aliaj lingvoj.

Perseo - greka mito 3/3



Ĉe klifo staris katenita Andromedo kaj ĉe la fino de sablobenka ŝiaj reĝaj gepatroj. La reĝo kaj la reĝino ne povis disiĝi de sia amata filino.

Subite la maro ekŝaŭmis kaj komencis boli. Grandega monstro leviĝis de la mara grundo, disigis la ondojn kaj montris al Perseo sian skvaman glitigan korpon. Andromedo ekkriis, kaj ŝiaj desperaj gepatroj komencis laŭte lamenti. La monstro ŝovis ŝaŭman ondon antaŭ si antaŭen kaj naĝis al la klifo, kie

Andromedo terurigite kovris siajn okulojn per blankaj manoj.

Perseo ŝvebis malsupren al la monstro kaj tiu provis kolere kapti ties ombrojn, kiu falis sur la akvon. Jen jam la glavo de Perseo estis puŝita en la korpon de la giganta marserpento. La monstro saltis el la akvo alte supren, sed Perseo per siaj flugilaj ŝuoj evitis flanken. Denove kaj denove Perseo puŝis la glavon en ĝin, ĝis la sango de la monstro kolorigis la maron ruĝa. La serpento baraktis kaj defendis sin. La glavobatoj de Perseo ŝajne ne povis damaĝi al ĝi, la ekimozaj okuloj de la monstro persekutis ĉiun movadon de la heroo. Tiuj okuloj memorigis Perseon pri Meduzo. Rapide li tiris la kapon de Meduzo el la sako kaj montris ĝin al la monstro.

Jen la giganta serpento transformiĝis en ŝtonon kaj la maro glutis ĝin. Vortico kruta kaj profunda montris la lokon, kien la monstro sinkis surgrunde de la maro.

Andromedo forprenis la manojn de la vizaĝo. Kaj por Perseo estis tio, kvazaŭ ekbrilus la matena ruĝo post ŝtorma nokto.

Li metis la sakon kun la kapo de Meduzo, la protektsildon kaj la glavon sur la bordon kaj rapidis al

la junulino por liberigi ŝin de la katenoj. Li ankoraŭ neniam vidis pli belan inon.

Jam proksimiĝis la reĝo kaj la reĝino kaj dankis al la kuraĝa Perseo: "Deziru al vi oron, arĝenton kaj juvelojn, tiom da, kiom vi volas", diris la reĝo. "Mi donos al vi ĉion, kion vi postulas, ankaŭ sklavojn kaj ĉevalojn el nobla deveno."

"Pli prefera ol oro, arĝento kaj valorŝtonoj", respondis Perseo, "estus por mi, reĝo, via filino Andromedo. Permesu al mi edzinigi ŝin, se ŝi deziras tion."

Al Andromedo plaĉis la juna heroo kaj ŝi konsentis kun ĝojo.

"Mi ĝojas", diris la reĝo, "ke tia kuraĝa viro volas edzinigi mian filinon. Kiel triopo kaj plena de malĝojo ni venis, sed kiel kvaropo kaj plenaj de ĝojo ni reiros en la burĝon."

Perseo levis siajn armilojn kaj la sakon kaj miris. La plantoj kaj branĉoj, sur kiuj kuŝis la sako kun la kapo de Meduzo, ŝanĝiĝis en ŝtonecajn koralojn. Kaj kelkaj, kiuj estis tuŝitaj de la meduza sango koloriĝis ruĝaj. La koraloj komencis kreski kaj la maraj nimfoj pliiĝis la miraklon sub la akvosurfaco. En la maraj profundoj kreskis koralaj arbustaroj.

Perseo iris kun la reĝo, la reĝino kaj Andromedo en la burĝon kaj tie oni festis pompan geedziĝon. La reĝo havigis al la popolo festmanĝon kaj tiu, kiu venis en la urbon, trovis plenan tablon kaj povis manĝi kaj trinki laŭplaĉe.

En la burgo bankedis la plej elstaraj nobeloj kun la reĝo kaj la reĝino kaj en ilia mezo sidis la feliĉa Perseo kun Andromedo. Gaje tintiladis la arĝentaj pokaloj, la domo odoris laŭ incenso kaj floroj kaj la sonado de liroj plenigis la ĉambrojn. Sed meze de la gaja babilado, ridado kaj kantado subite miksiĝis el la direkto de la korto armila tintado, bruo kaj batalkrioj.

En la festenan halon sturmis, sekvata de militistaro, la pli frua amiko de Andromedo, Fineo. Li iam petis edzinigi Andromedon, sed kiam minacis ŝin la perejo, li ne protektis ŝin kontraŭ la monstro.

Nun li staris kun levita lanco antaŭ Perseo kaj kriis: "Mi venas por venĝi la rabon de Andromedo! Mi estas ŝia ĝusta fianĉo!"

Per kiel eble plej granda forto li ĵetis la lancon, sed ne trafis Perseon, kaj la lanco boris sin en kusenon. Tio estis la signo por la batalkomenco.

La militistoj de Fineo komencis kruelan sangoverŝiĝon, ili ĉirkaŭis Perseon kun sia supereca forto kaj urĝis lin al la muro. Kuraĝe Perseo defendis sin kontraŭ la malamikoj per sia glavo, ĝis la armilo en lia mano fariĝis varmega. Kiam li vidis, ke minacas lin malvenko, li kriis: "Kiu estas mia amiko, tiu forturniĝu!" Kaj poste li tiris la kapon de Meduzo el la sako. Li

etendis ĝin al la malamikoj kaj mem forturnis la kapon. Per unu fojo la adeptoj de Fineo rigidiĝis.

Iliaj levitaj kaj forte armitaj brakoj fariĝis ŝtonaj, tiel, kiel ankaŭ la manoj kun la eltiritaj glavoj. Perseo paŝis tra la aro de la ŝtonigitaj militistoj kaj serĉis Fineon. La malkuraĝa iama fianĉo kaŝiĝis, forturnis la kapon kaj petis Perseon pri kompatato.

"Vi estis sufiĉe kuraĝa disverŝi fremdan sangon kaj mortigi pacemajn homojn", diris Perseo, "tia kuraĝo meritas monumenton." Li etendis al Fineo la kapon de Meduzo kaj Fineo silentiĝis kaj rigidiĝis.

Ankaŭ la ŝtona Fineo havis timeman vizaĝesprimon kaj kaŭris malkuraĝe en angulo.

Perseo ne restadis longe en la fremda lando. Li esperis revidi sian patrinon. Tial li grimpis kun Andromedo sur ŝipon kaj velis al la insulo, kie li ekvagis por aventuroj.

La reĝo povis nur malfacile kaŝi sian ĉagrenon, kiam li vidis, ke Perseo revenas sana kaj havas junan edzinon ĉe sia flanko.

"Ĉu vi eble finfine ankaŭ kunportis la kapon de Meduzo?" li demandis mokeme.

"Mi kunportis ĝin", respondis Perseo ridete.

"Mi sciis, ke vi estas aŭdaca", mokis la reĝo, "sed mi ne sciis, ke vi ankaŭ povas mensogi tiel aŭdace."

"Ĉu vi, reĝo, volas vidi la kapon de Meduzo?" demandis Perseo. "Mi ne konsilas tion al vi. Kiu vidas ĝin, fariĝas ŝtono."

"Scias nur la dioj, de kiu vi detranĉis la kapon", mokegis la reĝo, "eble de virŝafo aŭ de ŝafo."

Perseo koleriĝis pro la vortoj de la reĝo. Li deturniĝis, malfermis la sakon kaj montris la kapon de Meduzo al la reĝo. Kaj tiumomente transformiĝis ankaŭ la malfidema reĝo en ŝtonon.

La patrino aŭdis de la servistoj, ke Perseo revenis kaj rapidis renkonte al li. Ĝojplene ŝi ĉirkaŭbrakis la filon kaj bonvenigis ankaŭ lian edzinon.

"Gardu vin kontraŭ la reĝo", ŝi avertis Perseon kaj rakontis, ke la reĝo volas pereigi lin.

"Ne estas plu kaŭzo por zorgo", diris Perseo kaj rakontis al la patrino, kio okazis.

Perseo fariĝis reĝo. Li vivis kun Andromedo kaj sia patrino sur la insulo. Sed de la malnova orakolo li ne povis fuĝi.

Amika reĝo invitis Perseon al festaj ludoj en sian urbon. Perseo partoprenis la konkursojn kaj ĵetis la diskon tiel mistrafe, ke ĝi falis en la spektantaron kaj frakasis la kranion de maljunulo. La maljunulo estis lia avo Akrisio, kiu multajn jarojn antaŭe ordonis ĵeti sian filinon kaj la nepon en kesto en la maron. Pro timo pri la orakolo la avo fuĝis el sia burgo kaj vagadis kamuflite tra la mondo. Sed la sorto trovis lin kaj la orakolo plenumiĝis.

Profunde kortuŝite Perseo enfosis sian malfeliĉan avon kaj reiris al sia regno.

Saĝe regis reĝo Perseo. La sorĉodonacojn li redonis al la diino Atena. Nur la sakon kun la kapo de Meduzo li ankoraŭ retenis dum certa tempo. Neniu malamiko kuraĝis ataki lian landon. La kapo de Meduzo protektis dolĉan pacon.

Tiun ĉi grekan miton prilaboris kaj produktis Vladimir Türk kaj Jarka Malá el Ĉeĥio.

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2017/04/perseo-33-greka-mito.html>

Kio ni estas kaj kion ni celas (7)

7. Homa emancipiĝo

SPOMENKA ŠTIMEC - Verkisto

Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo - projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

ESPERANTO eniris la dekduan jardekon de sia ekzisto. Kvankam tio estas "nur eta parentezo de la historio, nur fingroĉerpeto el la senfunda tempujo" (laŭ la akademiano Ivo Rotkviĉ parolinta pri la tempopasado), restas profundaj spuroj de Esperanto en la mondo kiu nin ĉirkaŭas.

Unu el tiuj fokusoĵoj en kiuj Esperanto elstaris en la pasintaj jardekoj estas la emancipiĝo. Esperanto helpis al multaj siaj uzantoj liberigi sin el la dependo de la nacia lingvo kaj la nacia kulturo, kien plantis nin la naskiĝo. Ĝi levas siajn uzantojn ekster la limojn en kiujn onin enfermis la nacia lingvo kaj la nacia eduko,

ĝi portas nin super la landlimojn kaj renkontigas nin kun la aliaj homoj, moroj, kulturoj kaj mondoj.

Multajn homojn kiujn ĝi allogis, ĝi sorĉis per aldona plezuriga eco: ĝi ebligas al siaj uzantoj kreivon - la parolantoj de Esperanto ĝuas la lingvon, ĝi donas al ili plezuron de "trafa ŝerco" kaj "kvalita vino" (laŭ Piron), ĝi donas plaĉon al la parolanto dum tiu ornamas sian frazon per vortumoj sukplenaĵ kaj nuancitaĵ, kiajn la denaska lingvo ofte ne kapablas proponi. Ne malpli da plezuro donas ĝi al la deĉifronto, la akceptanto de la mesĝo.

Esperanto rompas la kadrojn en kiujn perforte enfermas nin la edukiĝo, al kiu ni estas submetitaj. Ĝi proponas pliajn fenestrojn al la scioj de la mondo per rimedoj modestaj, rapidaj kaj nekostaj.

Kvankam Esperanto pro sia deveno kaj siaj celoj ankoraŭ ne elluktis por si la statuson de la lingvo egalrajta al la aliaj lingvoj, kaj kvankam ĝi mem ankoraŭ atendas sian plenan emancipiĝon, intertempe ĝi emancipas siajn parolantojn. Esperanto tamen ne portas emancipon al ĉiuj siaj parolantoj. Nur tiujn ĝi komfortigas per emancipiĝo, kiuj kapablas eluzi la latentajn riĉojn de la lingvo. La parolantoj kiuj investis en la lingvon iom pli ol la energion kaj tempon necesajn por la baza lingvoakiro, estas abunde rekompencataj, precipe kiam ili esploras la eblajn sed ĝis nun ankoraŭ neplugitajn vojojn de la internacia apliko.

La plej gravaj motivoj por daŭra okupiĝo pri Esperanto inter membroj de UEA (1991):

rango	relativa valoro
1	kontribuo al pli bona mondo 6,02
2	kono de homoj el aliaj landoj 5,63
3	intereso pri lingvoj 5,04
4	sento de aparteno al la E-komunumo 4,66
5	legado de libroj kaj revuoj 4,38
6	vojaĝado 3,80
7	personaj rilatoj kun proksimuloj 3,26
8	utileco en profesio aŭ ŝatokupo 2,18

Raŝić 1994, p.86



"... kvankam ĝi mem ankoraŭ atendas sian plenan emancipiĝon, intertempe ĝi emancipas siajn parolantojn."

Dum oni aliras Esperanton oni ne konjektas ties emancipan dimension. Ĝi lasas sin malkovri poiome, ĝi montras sin kiel kromrezulton de la lingva alproprigo.

Esperanto kun si portas aliron al multspecaj kaj diversfonaj scioj. Kvankam ni ĉiuj plurfoje fariĝas atestantoj pri tio ke Esperanto ne estas estimata,

evidentiĝas ke eĉ tiuj kiuj ne estimas Esperanton, montras estimon al la scioj kaj spertoj akiritaj per la internacia lingvo.


Kion alportos la ir-peno supren en la jardekoj venontaj dependos ĉefe de ni, la uzantoj de la lingvo, kaj de nia kapablo ne nur ĝui, sed ankaŭ tiri la konsekvencojn el la malsklavigo kaj egalrajtigo kiujn Esperanto ebligas.

"La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu 'ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn', donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la esperantismo ne respondas."

El Deklaracio pri la esenco de la esperantismo (Bulonjo-ĉe-Mar, 1905)

Dankon Amiko (7) - de Claude Piron

- mez-nivela



(9)

Dum Rikardo tiel bele rolis kiel arestanto, dis-opinioj ne tre amike esprimiĝis en la tuj apuda dancejo.

“Restu ĉi tie, se vi volas, sed mi ne lasos lin sola kontraŭ ŝtelisto eble danĝera,” Katarina diris decidplene.

Milan ne tuj respondis. Li ne ĝuste komprenis kial, sed tiu ideo ne plaĉis al li. Fine, li eligis kelkajn vortojn, kiujn li kvazaŭ prenis el la buŝo de Sandro, la amiko matene renkontita:

“Se ni konstante kuros helpi lin ĉe la plej simpla problemo, li neniam fariĝos vera viro, li restos plorema infaneto, eĉ se li estas korpe pli forta ol multaj, perfekte kapabla sin defendi.”

Sed Katarina nur levis la ŝultrojn.

“Mi iras,” ŝi diris. “Faru laŭ via plaĉo.”

Milan nur povis iri kun ŝi.

“Estas la tuj apuda konstruaĵo,” ŝi pluparolis. “Ne povus esti pli proksime.”

Post kelkaj momentoj ili laŭiris la muron de Plinov.

“Help!” sonis voĉo de ie sube, kaj aŭdiĝis bruo, kvazaŭ iu batus ion.

“Estas Rikardo!” Katarina diris. “Kiel ni povas...?”

“Venu,” Milan respondis ekkurante, “mi memoras, kiun pardon uzas la Sekuriks-gardistoj. Ankaŭ mi iam sekuriksitis ĉi tie. Certe ĝi estos malŝlosita. Jen, ni alvenas.”

Sed iom antaŭ ol li ektuŝis la pardon, ĉi-lasta malfermiĝis mem, Milan mire konstatis, ke elpaŝas ulo

vestita per Sekuriks-uniformo, kaj ke tiu ulo havas vizaĝon, kiun, fote, la polico vaste diskonigis: teroristo, kiu respondecas pri la morto de pluraj dekoj da homoj pro eksplodo, kiun li okazigis tagmeze, antaŭ kelkaj semajnoj, en loko plena je preterpasantoj.

Li provis kapti lin, sed la alia sendis al li baton tiel fortan, ke Milan falis sur la trotuaron. La junulo tamen ne perdis tempon. Kelkaj momentetoj sufiĉis, por ke li restarigu sin kaj ekkuru post la teroristo.

(10)

Katarina, dume, pasis en la ĉiovendejon. Ŝi sukcesis fari lumon kaj direktis sin laŭ la sonoj al la malsupra loko, kie Rikardo estis enŝlosita. Feliĉe, la ŝlosilo estis en la pordo. Tiun ŝi do facile malfermis.

“Katarina!”

Li ĵetis sin al ŝi, ektenis ŝin en siaj brakoj. Ĝis kiso li ne kuraĝis iri, kvankam li forte emis.

“Rakontu! Kio okazis?”

Ambaŭ informis la alian pri la ĵusaj okazaĵoj.

“Sed li estas Sekuriks-gardisto!”

“Tute ne! Vera gardisto tiel ne agus. Kiam li faligis Milan, estis klare, ke li volas plej rapide forkuri.

Honestulo ne farus simile. Li sukcesis havigi al si uniformon, ĝuste ĉar li antaŭvidis la riskon renkonti iun kiel vin. Li sciis, ke tio estigos hezitmomenton, kiun li povos sukcese uzi. Sed ni ne perdu tempon. Tiu ulo estas danĝera. Ŝajnas al mi, ke mi jam vidis lian vizaĝon. Ial ĝi elvokas ion mortigan. Kie li estis? Kion li faris? Ni iru tuj kontroli.”

Rikardo bone memoris la lokon, kie troviĝis la

ombro, kiam li malkovris la ulon. Ili tien iris.

“Rigardu, tio... tiu afero, kiun li fiksas sub la montrotablo tie ĉi... Ĉu tio ne estas... Mi memoras, kial lia vizaĝo ŝajnis konata! Estas unu el tiuj teroristoj, kiujn la polico serĉas. Fotoj de li aperis ĉie en la lando. Ĉu vi ne vidis? En la stacidomo ili estas sur ĉiu muro, kun indiko, ke se iu povas doni al la polico informon, kondukantan al trovo, li ricevos mi-ne-memoras-kiom da mono. Ni tuj telefonu al la polico.”

“Katarina, mi petegas vin, tion ne faru!”

La sono de la rikarda voĉo mirigis la knabinon, tiel timplena ĝi estis.

“Sed... ni ne povas lasi ĉi tion... kial ne telefoni?”

“Mia laborpermeso! Ĝi estas malvera! Se la polico esploros, pridemandos min, ĝi certe kontrolos kaj...”

“Ili tion ne rimarkos, aŭ ne konsideros.”

“Mi timas. Mi prezentis min al la polico, kiam Janĉjo ŝtelis mian monon kaj mian veturbileton. Ili do jam scias pri mi.”

“Tio estas tute alia afero. Ili ne...”

“Je la nomo de Dio, mi petegas vin, Katarina, lasu

min ekster tiu afero.”

“Nu, mi provos ne enmiksi vin, sed ni havas respondecon antaŭ la multaj personoj, kiujn tiu aĵo povas mortigi. Ĉiaokaze, vi devas tuj informi la centran oficejon de Sekuriks. Vi ne povas ŝajnigi, ke okazis nenio.”

Rikardo tremis tutkorpe. Li kapablis diri nur:

“Terure, terure!”

Kaj post momenteto:

“Ĉu mi devos diri la veron? Ke mi ne defendis min? Ke mi lin lasis enŝlosi min ie subtere? Mi tuj perdos mian laboron!”

“Nu, la veron ni povas aranĝi. Ni povas diri, ke vi provis kapti lin, sed ke li sukcesis sin kaŝi en la magazeno, kaj poste forkuri, sed ke, vidante la lokon, kie li kaŝfaris ion, vi iris kontroli kaj trovis ĉi tiun aĵon.”

“Vi pravas. Mi estas morte tima, sed mi komprenas, ke nenion alian mi povas fari. Mi iros telefoni. Ĉu vi bonvolas veni kun mi? Via apudstaro estas ege necesa.”

(daŭrigota)

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (13)

EL LA UNUA PARTO - TAŬO

25

Ekzistas io, kio estas sen diferencigo perfektigita.

Antaŭ ol estis Ĉielo kaj la tero, ĝi jam estis, tiel kvietas, tiel sola.

Sole ĝi staras kaj ne ŝanĝiĝas.

En cirklo ĝi iradas kaj ne endanĝerigas sin.

Oni povas nomi ĝin la patrino de l' mondo.

Mi ne scias ĝian nomon.

Mi nomas ĝin TAŬO.

Pene donante nomon al ĝi,

mi nomas ĝin granda.

Granda, tio signifas ĉiam moviĝanta.

Ĉiam moviĝanta, tio signifas foran.

Foran, tio signifas revenantan.

Tiel TAŬO estas granda, Ĉielo granda, Tero granda,

kaj ankaŭ la homo granda.

Kvar grandaĵoj estas en la spaco,


kaj la homo estas unu el ili.

La homo sekvas al la tero.

Tero sekvas al la Cielo.

Ĉielo sekvas al TAŬO.

TAŬO sekvas sin mem.



Rimarkoj de Anniespera

Pri la vorto „endanĝerigas“ (fonetike ĉinlingve dai) rimarkindas, ke unu el la signifoj de la vorto nuntempe ja estas "danĝera", sed en la verkita tempo, temas pri "mallaborema / maldiligenta".

Vilhelmo:

"Oni povas nomi ĝin la patrino de l' mondo.

Vd. el Wang Chongfang:

"Ĝi povas esti rigardata kiel la Patrino de ĉio sub la Ĉielo."

Rimarkoj de Wang Chongfang

"Tio ĉi estas unu el la plej gravaj ĉapitroj de la filozofia verko de Laŭzi. Ĝi priskribas la Taŭon kiel ion estiĝintan jam antaŭ ol la Ĉielo kaj la Tero kaj ĉiuj aliaj ekzistaĵoj. La Taŭo estas transcenda, ĉar ĝi estas trans la homaj sensoj. Ĝi estas movopova kaj ĉiam moviĝas. En la universo ekzistas kvar grandaj estaĵoj, t.e. la Homo, la Tero, la Ĉielo kaj la Taŭo. Kompreneble, la Taŭo estas la plej alta inter la kvar, kaj el ĝi naskiĝis la tri aliaj. En tiu ĉi ĉapitro estas aparte atentinde, ke Laŭzi uzas kvar esprimojn por priskribi la movadon de la Taŭo: esti senfine granda, iradi konstante, atingi foren, reveni al la origino. Kunmetante popare tiujn ĉi kvar esprimojn, li konstruas tri frazojn, kiuj montras la procezon de la movado en senfinaj cikloj de la Taŭo. Jen la karakteriza trajto de la movado kaj la eterneco de la Taŭo."

(daŭrigota)

Mallonga Historio de Filozofio (19)




Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Jean-Jacques Rousseau

Vasil Kadifeli

Jean-Jacques Rousseau (1712-1778)



En la jaro 1766, fremdulo estis sidanta en la teatrejo de Drury Lane en Londono.

La spektantoj estis pli interesiĝantaj pri li ol la teatraĵo. Tiu homo estis la fama sveda pensulo **Jean-Jacques Rousseau**, kiu estis invitita de la apude sidanta famulo **David Hume** (vidu numeron #19).

Rousseau estis fama en la kampo de literaturo kaj filozofio kaj jam kelkaj el liaj libroj estis palermesataj per la eklezio. Rousseau pensis, ke la vera religio estas en la koro do, oni ne bezonas pompajn ritojn por tio.

En sia libro **“Pri la socia kontrakto”** li skribis: “homo naskiĝas libera tamen li ĉie estas enkatengita per ĉenoj”. La revoluciistoj jam parkerigis liajn pensojn kore, kiel faris la fama franca gvidanto **Maximilien Robespierre** dum la franca revolucio. Ili volis liberigi la povrulojn de la ĉenoj per kiuj la riĉuloj kaj nobluloj enkatengis ilin. Ili volis veran liberecon aldone al frateco kaj egaleco. Rousseau mortis dek jarojn antaŭ la franca revolucio, sed li tute ne aprobus la faraĵojn de Robespierre, kiu senkapigis la malamikojn per gilotino dum la **“terora periodo”** de la franca revolucio. Tiuj ne povus esti la pensoj de Rousseau, sed prefere la pensoj de **Nikolo Makiavelo** (vidu numero #011).

Rousseau kredis, ke homoj nature estis bonaj. Se ni estus vivantaj izolate en arbaro, tiam tute ne okazus problemoj, sed ni formis urbojn, ni forlasis naturon kaj komencis loĝi kune, do ni formis komunumon kaj pro tio ekaperis la malbonaĵoj. Tiel komencis konkuradoj en la popolo por protekti iliajn profitojn kaj ili provis regi unu super la alia. Ni plue inventis monon kaj tio rezultis al pluaj teruraj psikologiaj malsanoj. Civilizacio koruptis ĉion.

Sed Rousseau estis optimisma kaj asertis ke li trovis solvon por plibonigi la situacion. Lia aserto estis bazita sur la **“ĝenerala volo”**. La “ĝenerala volo” estis la plej bona afero por la tuta komunumo kaj la ŝtato. Same al **Thomas Hobbes** (vidu numero #012) kaj **John Locke** (vidu numero #016), kiam oni volas vivi kune oni devas forlasi parton de sia libereco pro la diversaj reguloj kaj leĝoj. Do, ĉu vere eblas esti ankaŭ libera? Li diris, ke por vivi en komunumo oni devas obei ĝiajn regulojn, do anstataŭ la pensoj de onia kontraŭi al tiu obeado, oni devas kunigi siajn pensojn al ĝi.

Sed, por ke ni ne miskomprenu la aferon ni devas doni ekzemplon: Ĉiuj volas malaltajn impostojn kaj tio ja estas ilo en propagandado. Do, se oni demandus pri tio, la publiko elektus la malaltajn impostojn. Tamen, tiu ne estas la “ĝenerala volo”. Laŭ Rousseau ĝi estas la “ĝenerala voĉo” de la publiko pri kio ili “devas voli” ne por la bono de kelkaj homoj aŭ parto de la komunumo sed por la tuta popolo. Do, prefere impostoj devas esti sufiĉe altaj por la bono de la komunumo. La homoj devas vole obei al leĝoj, kaj leĝoj devas esti almenaŭ en akordo kun la “ĝenerala volo”. Tiel anstataŭ homoj postkuri siajn profitojn, ni kreas sistemon, kiu prizorgos la komunumajn profitojn.

Leĝojn devas fari iu inteligenta **“leĝisto”** kaj leĝoj devas esti en akordo kun la “ĝenerala volo”. Plue ĉiuj homoj devas esti parto de tiu “leĝisto”. Tamen se oni ne volas obei al la “ĝenerala volo” tiam, tiu devas esti per forto devigota obei al ĝi kaj tiel, tiu estos “liberigota” ! Tio ŝajnas absurda sed por Rousseau ĝi estis normala afero. Homoj estas parto de pli granda grupo do ili devas obei la “ĝenerala volo”, ili nur tiam povas esti liberaj ene de ĉi tiu grupo. Tio eble ne estas bone komprenata, sed postaj filozofoj al tio aldonis ke oni devas fari siajn “politikajn preferojn kaj elektojn libere”.

Rousseau pasis sian vivon vojaĝante de loko al loko por eviti persekuton pro siaj pensoj.

(daŭrigota)

Nekrologo: Michael Bond (13.01.1926-27.06.2017)

Başak Aray, Turkujo



Je la 27-a de junio forpasis Michael Bond, angla verkisto konata pri “Paddington la urso”, nun-klasikaĵo de porinfana libroserio. La hero estas ursido el sovaĝa Peruo, kiu amegas marmeladon, kaj kiu

alvenas Londonon kiel klimata rifuĝinto. Ĉirkaux sia kolo estas akroĉita letereto, kiu legiĝas “Bonvolu zorgi pri ĉi tiu urso”. Iam en Londono, ĝi senespere provas paroli kun homoj kaj peti helpon, sed ĝi estas ignorita. Ĝi finfine renkontos bonkoran familion kiu adoptos la kompatindulon. Ili nomas ĝin Paddington, la nomo de la stacidomo kie ili trovis ĝin, ĉar ili ne eblas prononci alian ursan nomon. La rakonto parolas pri la duobla kultura ŝoko spertata de Paddington kaj sia nova familio. La libro rakontas amuzaj okazaĵojn dum Paddington malrapide adaptiĝas al sia nova vivloko.



Paddington fakte estas kortuŝa rakonto inspirita de rifuĝintaj geknaboj kiujn Bond vidis dum la mondmilito, kaj kiuj estis alportitaj en la stacidomo Reading, akompanitaj nur de malgranda sako kaj manskribita letereto akroĉita al siaj koloj. Per la ĉarma personeco de Paddington, Bond invitas siajn legantojn al komparto por rifuĝintoj kaj edukas ilin pri problemoj,

kiujn rifuĝintoj alfrontas. Alia interesa fakto pri Paddington temas pri sia speco: li apartenas al vundebla subspeco nomata okulvitra urso. Ĉi tiuj ursoj troviĝas nur en la Andoj (montoj en Sudameriko), kaj riskas morton kaŭze de perdo de habitato.




Bond naskigxis en Newbury (Berkshire, Anglio) kaj studis en Reading. Dum la dua mondmilito li servis en la Reĝa-Aerforto kaj la Middlesex regimento de la Brita armeo. Antaŭ sia

kariero kiel skribisto, li estis kameraisto ĉe BBC. La rakonton de la urso Paddington inspiris al li pluŝa urso, kiun li aĉetis okaze de kristnaska vespermanĝo en la jaro 1956. Ĝi estis tute sola sur la breto en vendejo. Tio tristigis Bond-on, kiu tuj aĉetis ĝin kiel donaco al sia edzino. La paro nomis la urson Paddington, ĉar tiam ili loĝis apud la samnomata Londona stacidomo. Bond komencis verki rakontojn pri ĝi, kaj “post 10 tagoj li jam havis libron en siaj manoj”. La unua libro de la serio Paddington estis publikigita en la jaro 1958 kaj la serio ĝis la jaro 1968. La sukceso de la libroj tiom disvastiĝis, ke eblis al la verkisto forlasi sian laboron kaj dediĉi sin al plentempa verkado. 35 milionoj da Paddington-libroj estis venditaj ekde la unua publikigo. Ili ankaŭ estas tradukitaj al 40 diversaj lingvoj. La rakonto de Paddington estis adaptita al TV-serio ĉe BBC en la jaro 1975, kaj al kino en la jaro 2014. Bond ricevis ordenon de brita imperio pro sia verko.

Verkis : **Başak Aray** el Turkujo

Tahsin Yücel kaj lia romano “Mensogo”

Başak Aray, Turkujo



Tahsin Yücel (1933-2016) estis grava verkisto, tradukisto kaj semiologo de Turkujo. Li finis la Galatasaray Liceon, poste studis en Istanbul Universitato en la fako de franca Filologio kaj diplomiĝis.

Sed li daŭrigis siajn studojn en la fako de semiologio. Li iris al Parizo por pliaj esploroj kaj preparis sian tezon. Li revenis al Istanbul kaj doktoriĝis.

Tahsin Yücel estas ĉefe konata por siaj kontribuoj en la turka lingvoreformado. Li ne nur kore subtenis la lingvoreformon dum sia tuta vivo en siaj teoriaj verkoj, sed li mem ankaŭ konstruis novajn vortojn, por



anstataŭigi la malnovajn kiuj devenis el fremdaj lingvoj kiel la araba, persa kaj franca. Kontraŭ konservemaj

kritikoj, li insistis pri la graveco de la kreema povo de la lingvo kaj ĝia libera uzado per ĉiuj homoj (ĉefe de pensuloj, artistoj kaj verkistoj) por ke ili pli bone esprimi siajn ideojn.

Tahsin Yücel ofte deklaris sian admiron por la faraĵoj de Atatürk por modernigi Turkujon. Kiel lingvisto, li interesiĝis ĉefe pri la lingva aspekto de la modernigado, kaj li ĉiam defendis la novajn vortojn. Dum liaj klopodoj traduki strukturismaj kaj semiologiaj verkoj li enkondukis novajn turkajn vortojn kiel alternativojn por la terminologio en ĉi tiuj fakoj. Li estas aparte fama por la tradukaĵoj de la verkoj de Claude Lévi-Strauss kaj Roland Barthes. Krome, Gustave Flaubert, Raymond Queneau, Marcel Aymé kaj Joris-Karl Huysmans estas inter la francaj novelistoj kies verkojn tradukis Tahsin Yücel.

Lia intensa tradukagado oferis al Tahsin Yücel gravan ŝancon por konatigi siajn neologismojn. Ĉi tiuj ofte rimarkiĝas per sia fideleco al pure turkaj radikoj. Tahsin Yücel gravigis la lingvan purigadon ĉar laŭ li tiel la lingvo fariĝas komprenebla al ĉiuj, eĉ sen instruado. En sia libro “Dil Devrimi” aŭ “Lingvorevolucio” li kontraŭis la malnovajn vortojn ĉar ili estis nealireblaj al ordinaraj homoj. Fakte, por Tahsin Yücel kaj la aliaj reformistoj, la osmana lingvo estis “artefarita” lingvo kiu nur estis komprenata kaj aktive uzata de ia privilegia malplimulto. La reformistoj, post la fondo de la Turka Lingva Asocio en la jaro 1932, komencis esplori lokajn parolojn en la tuta lando, por kolekti vortojn kaj esprimojn uzatajn de la popolo. Ili uzis ĉi tiujn materialojn, unue por enigi ilin en la oficiala lingvo, poste por krei novajn vortojn bazitajn sur ili. Ili ankaŭ remalkovris malnovajn sed verajn turkajn vortojn el la jaroj antaŭ la fondo de la Osmana Imperio, kaj sukcese popularigis multajn de ili.

Unuflanke, la “turkigado” celis faciligi la lingvon por ke ĝia instruado estu pli efika. Antaŭ ĉio, la oficiala adopto de la latinaj leteroj multe pliigis la legkapablon de homoj. La turka skriboreformo estas granda afero, kiu ankoraŭ hodiaŭ impresas historiistojn surbaze de ĝia radika kaj subita realiĝo. Otto Jespersen, dana lingvisto, kiu pledis por internacia helplingvo kaj mem kreis la lingvon Novial, laŭdis la latinigadon en Turkujo. Aliflanke, la lingvoreformo estis parto de la proksimiĝo de Turkujo al la okcidento post la fondo de la respubliko en 1923. Forlasi la malnovan uzatan lingvon kaj konstrui novan alternativon, estis ankaŭ la negado de la estinteco kaj la anstataŭado de ĝi per la nova, postrespublika kulturo.

Ĉefe la arabaj kaj persaj vortoj estis ligitaj al islama tradicio: do, la kreado de lokaj, “pure turkaj” alternativoj celis la forigon de la islama influo el la

publika konscio. La lingvoreformado estis fakte pli ĝenerala socia movado, kies limoj ne estis nur sur lingvo. Tahsin Yücel publike esprimis sian subtenon por ambaŭ aspektoj de la reformo. Kontraŭ la defendantoj de la malnova lingvo, li afirmis: Lingvo estas ilo por homoj, kiuj volas komuniki kaj estas tute ĝuste adapti tiun ilon al la bezonoj de homoj. Inter vorto kaj koncepto ne estas natura aŭ divina ligo, homoj rajtas proponi novajn parolformojn libere.

Esperantistoj havas korinklinon al lingvoj – tial, mi pensas, ke “Yalan” aŭ “Mensogo” estas la plej interesa inter la noveloj de Tahsin Yücel por niaj legantoj ĉar ĝi temas pri lingvisto aŭ, pli ĝuste, kvazaŭlingvisto. La heroo Yusuf estas legema knabo, kiu amegas enciklopediojn pli ol ĉiuj aliaj. En sia juneco li perdis sian patron kaj ne plu memoras lin. Lia vivo ŝanĝas kiam en sia lernejo alvenas nova lernanto el Londono kiu nomiĝas Yunus. Li ĉiam memoros iliajn unuan renkontiĝon kiel miraklon. Yunus havas rimarkindan karakterizaĵon: li estas balbutulo. Ĉiuj aliaj knaboj mokas lin pro tio, tamen Yusuf ĝoje amikiĝas kun li kaj li tiel kore admiras lin, ke iom post iom Yusuf konvinkiĝas, ke Yunus estas tiel brila kaj unika knabo, do balbuteco certe devas esti ia supereco! Yunus venas de riĉa familio loĝanta en tre bela kvartalo de Istanbul. Ankaŭ li perdis sian patrinon, do sia patro kaj la patrino de Yusuf proksimiĝas unu la alian ĝuste tiel, kiel iliaj infanoj. Dum sia unua vizito ĉe Yunus, Yusuf ĝoje malkovras la grandegan kolekton de enciklopedio en la domo de sia amiko. Tiu loko ŝajnas kiel paradizo al Yusuf! La du amikoj rapide fariĝas nedisigeblaj. Ilia komuna amo por lingvoj kunigas ilin.

La balbuteco de Yunus inspiras lin kaj sian amikon serĉi universalan lingvon. Kontraŭ ĉiuj aliaj, kiel instruistoj, libroj ktp, kiuj asertas, ke unue aperis parolado kaj nur poste ĝin sekvis skribado, Yunus obstine argumentas la inverson: unue aperis la skribo kaj poste homoj komencis paroli. Hontanta de sia balbuteco, Yunus kreas tiun teorion por konvinki sin kaj la aliajn, ke la apero de la parolado estis la komenco de degenerado. Yunus ofte parolas pri la supereco de bestoj, ĉar ĉiu speco parolas unu lingvon, kvankam homoj parolas multajn lingvojn kaj pro tio ili estas disaj kaj konfrontas lingvajn barilojn. Parolado nur aperis poste, pensas Yusuf kaj Yunus, do ĝi ne povas esti konsiderata natura – sekve oni ne povas diri ke balbuteco estas malkapablo.

En la vivo de du amikoj komencas nova periodo: ili sencese diskutas pri tiu teorio, kaj legadas por trovi pruvojn. Laŭ Yunus, balbutuloj estas homoj, kiuj ne

adaptiĝis al la artefarinteco de la homaj lingvoj, do li estas la taŭga homo por venki ĉi tiun artefarintecon kaj proksimiĝi al la natura lingvo – kiel la lingvo de birdoj. Yusuf kaj Yunus ankaŭ komencas lerni fremdlingvojn por plibone detekti la artefarintecon kaj provi diveni la originalan lingvon de homoj. Yunus promesas skribi libron por pruvi sian teorion, kiun li nomos “universala lingvistiko”, ĉar ĝi parolos pri la lingvo de ĉiuj specoj – ne nur pri la lingvo de homaro.

Kiam Yunus mortigas sin pro malsukcesa amo, sia patro edziĝas la patrino de Yusuf, kaj adoptas lin. Yusuf nun nomiĝas Yusuf Aksu, preskaŭ same kiel sia mortinta plejbona amiko Yunus Aksu. Li nun loĝas en la domo de sia amiko, kaj komencas vivi ekzakte tiel, kiel lia amiko vivis, kun la samaj servistoj, ĉirkaŭite de la samaj mebloj ktp. Li neniam forgesos sian amikon, kaj ne forlasos sian lingvorteorion. Li studas en la universitato nur dum mallonga tempo, tamen sufiĉe longe por gajni la scivolemon kaj la estimon de siaj gepatroj. Li babilas kun neniu, alvenas al la universitato en luksa aŭto akompanata de ŝoforo, kaj ŝajnas eksterordinare multescia. Unu tago, kiam siaj kunlernantoj insistas ke ili tagmanĝu kune, li parolas pri la ideoj de sia amiko, ke lingvo venas el skribo, ke ĝi fakte malhelpas la komunikadon ktp. Samtempe oni rapide malkovras, ke Yusuf scipovas la anglan pli bone ol la instruistoj. Tiel kreiĝas legendo ĉirkaŭ lia personeco. La pensoj de Yunus nun oni atribuas al li, kaj li famiĝas pro sia strangeco kaj saĝeco. Sed Yusuf ne finas siajn studojn, baldaŭ forlasas la universitaton kaj ekde tiam li vivas hejme, kun nur minimuma kontakto kun la ekstera mondo. Li longtempe vivas

kiel hermito. Sed lia famo daŭre kreskas. Post jaroj, malproksima konatulo kiu admiras ĉi tiun “lingviston” sukcesas kontakti lin. Li insistas, ke Yusuf partoprenu la internacian lingvistikan kongreson, kaj eĉ malfacile, sukcesas konvinki lin. En la kongreso, kiam Yusuf komencas prezenti “sian” teorion, oni tuj fajfas lin, granda disputo okazas. Dum la disputo oni perforte elprenas la prezent-paperojn de Yusuf, sed oni ŝokiĝas ĉar ili estas nur blankaj paperoj. Ĉi tiu okazaĵo ankoraŭ pligrandigas la famon de Yusuf, kiu nun estas jam konata kiel grandega lingvisto respektata en la tuta lando. Yunus, kiu estis la origino de tiuj ideoj, nun estas tute forgesita kaj Yusuf ĝis la fino de sia vivo daŭre suferas pro la mensogo kiun li senintence daŭrigis. Do, Yusuf, la heroo de Tahsin Yücel estas homo introverta, socie mallerta, daŭre fidela kaj premokupita de siaj ideoj kaj sia amobjekto.” Ĉar Tahsin Yücel aktive okupiĝis pri semiologio kaj antropologio, oni ne miras, ke sociaj legendoj estas la kutima temo de liaj noveloj. La objektoj de la legendoj en liaj romanoj estas diversaj : lingvistiko (“Yalan” – “Mensogo”), lipharoj (“Bıyık Söylencesi” – “Legendo de Lipharoj”), kuirado (“Mutfak Çıkmazı” – “Sakstrato de Kuirejo”), marksizmo (“Peygamberin Son Beş Günü” – “La Lastaj Kvin Tagoj de la Profeto”), kapitalizmo (“Gökdelen” – “Nuboskrapulo”), filozofio (“Sonuncu” – “La Lasta”) ktp. En ĉiuj de liaj noveloj troviĝas amuza rakonto pri estiĝo de legendo, kaj la duone aminda, duone ridinda heroo ĉiam estas absorbita per fiksa ideo, kaj per sinsekvaj okazaĵoj li fariĝas la objekto de la legendo malgraŭ li mem.

Verkis – **Başak Aray** el Turkujo

Ŝercoj



Albert Ajnŝtajn

Kiam li unuan fojon eniris sian oficejon en Princeton Universitato, oni demandis lin pri meblaro.

- Kion vi bezonas el meblaro?

- Unu tablon, unu seĝon, paperaĵon kaj multajn kajerojn. Ho! Kaj unu grandan korbon por rubaĵo!

- Kial grandan korbon? - mire oni demandis lin.

- Por enmeti ĉiujn miajn erarojn! - respondis la fama

sciencisto.

Fripono

Jugisto George Jeffrey [Ĝoĝo Ĝefri] estis tre akra rilate al akuzantoj. Foje li ekpuŝis la sidantan akuzanton per sia bastono dirante:

- Je la fino de ĉi tiu bastono estas granda fripono!

- Vere estas, sed je kiu fino? - respondis la akuzanto.



Kruĉvort-enigmo



Horizontale

1. La legenda inundego, kiun la bibliaj kompilistoj interpretis kiel intervenon de la dia justeco por pereigi la tutan pekan homaron kaj savi la diotiman Noa kaj lian familion; Havanta proksimume la formon de ovo aŭ elipsoido.
2. Dometo, destinita por loĝigi insektojn kiuj produktas mielon kaj vakson; Kaŭzo ke io estiĝu (volitivo).
3. Felo senharigita, tanita kaj preparita por la homa uzado; Orienta Afrika regno, inter Ugando kaj Tanzanio (Kigalio).
4. Mallongigo de la nomo "Turkujo"; Sedimenta aŭ rezidua petro tre etgrajna, ofte sub formo de glueca, knedebla tero, konsistanta el aŭ precipe el argilaj mineraloj.
5. (inverse) Superhoma estaĵo, kultata de homoj pro siaj supernaturaj povoj super homaro kaj mondo; Rilata aŭ apartenanta al mi; Pronomo uzata de iu, parolanta pri si.
6. (inverse) Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto; Ĉiu el la suverenaj politikaj unuoj; Morfemo, rolanta kiel frazo, per kiu oni asertas vera la tuton de la demanda frazo.
7. Fare de; (inverse) Ano de Polinezia gento, vivanta precipe en la norda parto de Nov-Zelando.
8. Regno en la orienta parto de Skandinavio; (inverse) Arkoforma akvomas', kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro, lago, ks, sub la blovo de la vento.
9. Regn' en la okcidenta parto de N-Afriko; Nom' de pluraj hebreaj reĝoj.
10. Konsistanta el pli-malpli pura metalo ruĝe flava aŭ flava kaj tre altvalora; Neorganizita grupo; Silabo kiu montras la duan tonon super la toniko en la relativa solfeĝo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1							■					
2								■				
3					■	■						
4			■	■							■	
5				■				■		■		
6			■						■			
7		■				■						
8							■		■			
9						■						■
10				■						■		

Vertikale

1. Hereda anomalio en la perceptado de la koloroj, precipe nekapablo distingi inter la verdo kaj la ruĝo.
2. Ano de popolo, kiu loĝis en okcidenta Eŭropo, de Irlando ĝis Sicilio, antaŭ la invado de la keltoj; Objekt' fabrikita por vendado.
3. Fel' senharigita, tanita kaj preparita por la homa uzado; Konsistanta el metalo grizblua, malmola, dratigebla, magnetigebla ktp.
4. Individuo, kies ecoj ne estas menciitaj (do ofte kun pejorativa nuanco); Disko, turniĝanta ĉirkaŭ akso kaj uzata por ebligi aŭ faciligi movadon.
5. Vinber'; La kontinento inter Atlantiko kaj Pacifiko.
6. Nomo de la dektria grafemo de la esperanta alfabeto; Ĉefurb' de Latvio.
7. Parto de la korpo, adaptiĝinta al speciala vivofunkcio; interjekcio esprimanta ekmiron, surprizon antaŭ io bona aŭ malbona.
8. (inverse) Morfemo, uzata kiel determinanto de substantivo kun signifo de nedefiniteco; (inverse) Pronomo uzata por nei pri la ĉeesto aŭ ekzisto de objektoj, aferoj, ideoj ktp.
9. Peco el delikata teksaĵo, uzata por kovri ion, precipe la vizaĝon de virinoj; (inverse) Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton.
10. Toskania rivero, trafluanta i.a. Florencon kaj Pizon; Nometalo sub formo de viole nigraj, metalbrilaj folietoj, kun viola vaporo, uzata en medicino kaj fotografado.
11. Relative maldika plat' el metalo, precipe el fero; Unu el la serio da kurbiĝoj de rivero, de vojeto, de ornamaj linioj.
12. Konciza, sencoriĉa eldiro, esprimanta principon aŭ person rilatan al scienco, arto, moro aŭ kredo.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo de ĉi tiu numero)

Kia estas la Usona Landa Kongreso?



Pasintlunde finiĝis la 65a Landa Kongreso de Esperanto-USA, la landa asocio de la usona esperanta movado. La 70 homoj kiuj kunvenis ĉe la Universitato William Peace estis junuloj kaj maljunuloj, venis de Majno ĝis Kalifornio, parolis ĝin flue dum multaj jaroj kaj ĵus ekstudis ĝin antaŭ kelkaj monatoj.

Tiuj ĉi kongresoj, kiam mi povas ĉeesti, ĉiam estas por mi unu el la plej altaj pintoj de la jaro. Mi havas kaj ĝuas la ŝancon paroli Esperanton kun homoj en mia urbo kelkfoje ĉiumonate, sed ĉeesti lokan kongreson estas tute alia afero. Dum kvar tagoj, la lingvo entute ĉirkaŭis min, kaj dum la semajnfino mi povis vivi en Esperantio. Ni trinkejumis en Esperanto, manĝis kune (fakte la manĝaĵoj estis sufiĉe bonaj por Esperanto-renkontiĝo), aŭdis poemojn kaj kantojn verkitajn de Esperantistoj, vizitis kelkajn muzeojn en Raleigh, kaj montris al la mondo (aŭ almenaŭ unu ege varma urbo en Norda Karolino) kiel nia lingvo funkcias.



La organizantoj ĉi-foje bonege diskonigis la okazaĵon interrete. Plej imponis la tujaj elsendoj pere de Facebook Live, per

kiuj oni elsendis multajn prelegojn kaj intervjuojn kun partoprenantoj, sed la gastigantoj ankaŭ aperis ĉe Twitter, Reddit, kaj Snapchat. Tio estas nova kaj ege bezonata paŝo antaŭen por la LK, kaj multe da homoj ja bonege utiligis tion. Ekzemple, ĝis nun 1,6 mil homoj spektis la enkondukon kaj ĉefprelegon de Humphrey Tonkin per Facebook.

Unu el la ĉefaj kialoj por ĉeestis estas la prelegoj, kaj la ĉi-jara kongreso povis logi sufiĉe interesan kaj buntan prelegantaron. La ĉefprelegisto, Humphrey Tonkin, eksprezidanto de UEA kaj nuntempa profesoro de literaturo, ĉiam donis amuzajn kaj instigajn prelegojn, ĉi-foje pri la historio de la usona movado kaj kelkaj konsiloj por le estonteco. Alia profesoro, Duncan Charters, diskonis scierojn lernitajn de la poliglota movado pri kiel lerni lingvojn.

La temo de Duolingo kaj la efiko de ĝiaj centmiloj da lernantoj sur la usona movado aperis denove kaj denove; Katalin Kováts venis de Nederlando por instigi nin pli aktive disvastigi Esperanton inter la lernintoj, kaj unu el la kreintoj de la kursoj mem, Margo Reves-Cohen (pli bone konata kiel RuthKC), estis tie. Ŝi kaj Liĉjo Miller rakontis iom pri la historio de la kurso ĉe Duolingo kaj eĉ diskonis iom pri kio okazos en la estonteco. Kaj kompreneble oni ankaŭ prezentis pri aferoj neesperantaj; Julinjo Schwartz havis elstaran kaj informplenan sesion pri transsekseco, kaj Wally du Temple festis la 150-jariĝon de Kanado per serio de tradukitaj filmetoj pri la inventoj kaj gravaj historioj punktoj de la lando.

La sperto por mi ĉi-jare krome estis iom malsama por du kialoj: unue, mi decidis tujpepi la tutan kongreson, kaj ricevis sufiĉe bonan respondon al tio. Mi neniam faris ion similan antaŭe, sed mi rapide lernis kiel ege mallonge resumi la ĉefpunktojn de la prelegoj. Mi sugestas al la partoprenantoj de la venontaj kongresoj (ekzemple UK kaj IJK, kiuj ekos tre baldaŭ) ke ili faru ion simile por ke la interretanoj kiuj ne povas ĉeesti pro manko de tempo aŭ mono.



Due, mi pli kaj pli interplektiĝas kun la usona movado, do pro tio mi elspesis iom pli da mia tempo ĉeestante kunsidojn, parolante kun la organizteamo, kaj helpante la kongreson ol kutime. Tio ja gravis, ĉar dum la kongreso Esperanto-USA decidis okazigi la venontjaran kongreson en mia urbo. Do mi esperas ke vi lasos min fini tiun ĉi resumeton per reklamo: bolvolu veni al la 66a Usona Landa Kongreso en Seatlo, Vaŝingtonio! Okazos inter la 13a kaj la 16a de julio, 2018. Mi kaj la aliaj kunorganizantoj promesas



multege labori por ke vi povos amuziĝi kaj vere sperti Esperanton. Kaj krome ni eble havos kelkajn surprizojn por vi...

Fonto: <https://medium.com/@arbarro/kia-estas-la-usona-landa-kongreso-49b3940967eb> (bonvolu klaki sur la video-bildoj)

Ĉu ni konas nian historion?



Jes ja, la **Sumera**¹ historio estas tre interesa. Peskaŭ ĉiuj memoras la laborojn de Mustafa Kemal Atatürk, la librojn de Churchward, le epopeon de Gilgamesh, la parton "**Genezo**"³ en la malnova testamento, la librojn kiujn verkis la sumerologo profesorino Muazzez İlmiye Çığ pri la Sumeroj. La sentezo kiu aperas el ili alportas la menson al diversaj lokoj.

Sed ni antaŭ ol digestis la ligan de nia historio kun tiu de Sumeroj, jen aperis aliaj trovaĵoj, kiuj alportas la homaran historion duoble pli malantaŭe ol tiu de Sumeoj. Vi eble aŭdis pri tio.

Antaŭ multaj jaroj mi hazarde atestis ekscitan diskuton de profesoroj en la universitato de Ĉikago. Ili estis diskutantaj novajn arkeologiajn trovaĵojn. Dum iliaj diskuto mi memoras ke mi elkriis la jenan frazon:

"Sed, se tio, kion vi diras estas vero, tiam la homara historio ŝanĝiĝos!"

La profesoro al kiu mi direktis mian elkriion respondis "Jes, la monda historio ŝanĝiĝos!"

La interesa afero pri tiu diskuto kiun mi ĉeestis estis, ke la trovaĵoj pridiskutitaj estis trovaĵoj en la terpeco de mia lando. Kompreneble en niaj ĵurnaloj estis nenio pri ĝi.

Ĉu la historio ŝanĝiĝis? Jes, ĝi ŝanĝiĝis! Ĉu ni turkoj zorgas pri tio? Vi mem donu la respondon! La politika cirkonstancaro en mia lando tute ne permesas, ke tiuj aferoj venu antaŭen en la vico de novaĵoj.

Hodiaŭ se vi trovos tri librojn en iu ajn vendejo pri tiuj trovaĵoj vi estus bonŝanca! Bedaŭrinde, ke ĉiuj tiuj libroj estas tradukaĵoj! Jes, ni informiĝas pri la graveco de la aferoj en mia lando el tradukitaj libroj.

Poste, kiam iu, kiu ne scias sin mem eldiras absurdaĵojn kiel "fakte ne ekzistas turko" niaj kleruloj (!)

deprimiĝas, ĉu ni vere ne ekzistas en la monda historio? Nu, eble ni forgesis nian historion kaj la fontojn de ĝi, sed ĉu ni estas tiel stultaj por ne

demandi, kio signifas la vorto "Turchia" en la arĥivoj de Ĝenovanoj?

Sed, ni revenu en la temo pri la trovaĵoj kiuj ŝanĝis la mondan historion. La loko nomiĝas **Göbekli**

Ahmet Özişik, Turkujo

Tepe² kaj troviĝas en la provinco **Urfa** en la sudoriento de Turkujo. La nomo de la arkeologo estas **Klaus Schmidt**. Li dum jaroj klopodis elfosi tiujn artaĵojn.

Antaŭ malmulta tempo li forpasis kaj mi legis la



intervjuon farita kun lia edzino. Ne sufiĉis ŝia funebrado sed oni ankaŭ forrabis ŝian domon. Kiel io, tia povas okazi?

Tiu viro elfosis la plej malnovan templon sur la mondo kaj elterigis ties gloron. Plue tiuj trovaĵoj estas eĉ en pli bona stato de tiuj en la mondfama Stonehenge en Britujo. Kaj en la trovaĵoj


estas multaj figuroj, kiuj neniam antaŭen troviĝis en aliaj lokoj kaj ilia aĝo estas duoble malnova de Stonehenge. Ili estas preskaŭ de 12.000 jarojn antaŭe.

Nun mi diros ke la cerbo haltas en ĉi tiu punkto, sed mi poste ne trovos aliajn vortojn por eldiri.

Eble la monda historio ŝanĝiĝis, sed ĉu nia rigardo al historio iam ŝanĝiĝos?

Se ni povus kompreni la Sumerojn, ni ankaŭ komprenus la trovaĵojn de Göbekli Tepe... Eble...

Göbeklitepe estas la plej malnova ĝis nun malkovrita antikva templo de la mondo! Kaj ĝi estas en nia terpeco!



verkis: **Ahmet Özişik**
tradukis: **Vasil Kadifeli**



¹ **Sumeroj**: Regiono de la malalta Mezopotamio, sudoriento de Babilono

² **Göbekli Tepe**: arkeologiejo en la sudorienta parto de la nuna Turkio, kie oni elkonstruis la konate plej malnovajn rondajn preĝejojn de la homaro. Por pli da detaloj vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/G%C3%B6bekli_Tepe

³ **Genezo**: La unua el la kvin libroj (Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono) en la komenco de la malnova testamento

Esperanto Kurso (19)



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un

"Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz,

sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LA ARITMETIKA LECIONO

Kelk-foje la infanoj lernas aritmetikon. Ili lernas la multiplikan tabelon.

Kelk-foje Fraŭlino Saĝa skribas sur la nigra tabulo:

Du-oble unu faras	du	$2 \times 1 = 2$
Du-oble du	" kvar	$2 \times 2 = 4$
Du-oble tri	" ses	$2 \times 3 = 6$
Du-oble kvar	" ok	$2 \times 4 = 8$
Du-oble kvin	" dek	$2 \times 5 = 10$
...		
Tri-oble unu	" tri	$3 \times 1 = 3$
Tri-oble du	" ses	$3 \times 2 = 6$
...		
Kvar-oble unu	" kvar	$4 \times 1 = 4$
Kvar-oble du	" ok	$4 \times 2 = 8$

Sed Johano malamas la multiplikan tabelon. Ĉe la fino de la mateno li ne sci-is ĝin.

"Vi ne estas diligenta, Johano," diris la instruistino, severe. "Kiam la aliaj infanoj iros hejmen, tiam vi devas resti en la lernejo kaj multipliki de unu ĝis dudek, per tri."

"Sed mi ne povas kalkuli ĝis dudek," diris Johano, plorante.

La instruistino skribis sur la nigra tabulo:

"Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, dek du, dek tri, dek kvar, dek kvin, dek ses, dek sep, dek ok, dek naŭ, dudek."

Malĝoje la knabeto prenis paperon kaj krajonon, kaj multiplikis ĉi tiujn numerojn per du!

Sözlük		kelka	bazı, birkaç, sayısı	multipliko	çarpım
duoble	iki kere (şekilde)		belli olmayan adet	oblo	kat, kez
foje	kez, kere	kelkfoje	bazı kereler, bazen	severa	ciddi, sert
kalkuli	saymak, hesap yapmak	multiplika tabelo	çarpım tablosu	severe	ciddiyetle, sert şekilde
		multipliki	çarpmak	tabelo	tabela, tablo, cetvel

Ekler

-obl- katlari işade etmekte kullanılır, (ör. iki kere üç = double tri) (ör. beşin üç katı = la trioblo de kvin)

Açıklamalar

Esperanto'da sayılar yazılırken her basamak arasında bir boşluk bırakılır ve her basamak kendi içinde birleşik yazılır. önek olarak: 35 = tridek kvin, 12 = dek du, 20 = dudek vs

Gramatiko - Lingvaj Respondoj (7)

Pri la sufikso «ig» kun verbaj radikoj

Oni ofte demandadis sin, ĉu kun la verbaj radikoj «igi» signifas «igi — anta» aŭ «igi — ata». Sed la demando per si mem estas ne ĝusta, ĉar «igi» kun verbo signifas nek «igi — anta», nek «igi — ata», sed nur «igi — i», sekve ĝi povas tre bone esti uzata en ambaŭ sencoj (aktiva kaj pasiva). En la plimulto da okazoj la senco de «ig» en verboj prezentas absolute nenian malklaraĵon; sed en tiuj okazoj, kie malkompreniĝo povas aperi, ni devas ĝin eviti ne per senbezona katenado de la senco de «ig» (kio estus tiel same neoportuna, kiel la katenado de «aĵ», pri kiu mi parolis en la respondo 11, sed per precizigo de nia frazo mem. Ekzemple, ni ne povas diri «sciigi amikon novaĵon», sed ni povas diri «sciigi amikon pri novaĵo» aŭ «sciigi novaĵon al amiko»; ambaŭ frazoj estas tute regulaj kaj ambaŭ estas tute klaraj, — kial do ni devas demandi nin, kiu el la diritaj frazoj estas la sole bona? En frazo, en kiu la verbo kun «ig» havas du komplementojn, la akuzativo kaj prepozicio montras tute klare la rilaton inter la ambaŭ komplementoj; frazo, kiu havas nur unu komplementon, estas ordinare ankaŭ tute klara, ĉar la forestado de le dua komplemento per si mem jam montras la sencon de la frazo (ekzemple, se mi, sen plua precizigo per «al», diros «mi manĝigas mian ĉevalon», neniuj duboj pri la senco de la frazo); fine en tiuj tre maloftaj okazoj, kiam ni efektive povas timi malkompreniĝon, ni ja tute ne bezonas aktivigi aŭ pasivigi la sencon de la sufikso «ig», sed ni povas tute bone kaj regule aktivigi aŭ pasivigi la verbon, dirante «manĝantigi» kaj «manĝatigi». La sufikso «ig» per si mem havas sencon tute difinitan (= fari, lasi, kaŭzi); ĝi fariĝas neklara nur tiam, kiam ni krom ĝia propra senco nepre volas altrudi al ĝi ian sencon aldonan, kiun ĝi per si mem ne havas kaj ne devas havi kaj kiu (en okazo de efektiva neceseco) devas esti esprimata per alia rimedo (ekzemple, sencon de aktivigado aŭ pasivigado, de daŭrigado aŭ momentigado k.t.p.).

Respondo 13, La Revuo, 1907, Aprilo

Pri forlasado de sufiksoj

En la frazo «la akvo plenigas la kruĉon» la senco diras al ni, ke la sufikso «ig» estas necesa, kaj uzi tie

la vorton «plenas» anstataŭ «plenigas» mi ne konsilus, ĉar ni tiam tro evidente pekus kontraŭ la logiko. Forlasi iun sufikson, por ricevi vorton pli mallongan, ni povas nur en tiaj okazoj, se la neceseco de la sufikso estas iom duba, ekzemple kiam la verbon, de ni uzatan, ni povas rigardi ne kiel devenantan, sed kiel memstaran, aŭ kiam la maniero de la deveno estas ne tute klara. Sed la verbo de la supre citita frazo ne sole tute sendube devenas de alia vorto («plena»), sed la maniero de tiu devenado estas tute klara, sekve ni devas uzi tiun klaran sufikson, kiu servas por la devenigo de la dirita vorto.

Respondo 44, La Revuo, 1908, Aŭgusto

Pri la deveno de la vorto «edzo»

Dank'al la afableco de S-ro D-ro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo ... La vere primitiva formo estas ne edz, sed edzin, de kiu devenas la formo edzo. Tiel same fraŭlo devenas de fraŭlino, kuzo de kuzino, kaj feo, kiun oni povus uzi, por montri fablan estulon, ekz. Oberono, kaj kiun oni povas devenigi de feino.

La vorto edzino estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita. Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon:

En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata Kronprinz, kiu fariĝas en Esperanto kronprinco.

La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane Kronprinzessin. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante kronprincedzino, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t. e. edzino, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinitan rilaton kaj due vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto edzino li tute logike devenigis la vorton edzo.

Laŭ artikolo de Emile Boirac en la Oficiala Gazeto, Dec. 1913.

(daŭrigota)

TURKA STELO

la revueto de la turka esperantistaro, aprilo 2017, n-ro 16

En Turkio aperas tre interesa kaj alloga Esperanto-revuo "Turka Stelo". Ĝin redaktas la sperta kaj aktiva esperantisto Vasil Kadifeli. En la aprila numero de la revuo, varia kaj riĉenhava, estas pluraj informoj kaj artikoloj: "Pedagogia efikeco" de Katalin Smidelius, "Esperanto kaj mi" de Jusuo Hori el Japanujo, poemoj de Maria Nazare Larosa, "Revoj de blanka kolombo" – rakonto de Elena Popova, ampleksa intervjuo kun la elstara esperantisto Boris Kolker, artikolo pri kuirarto, ŝercoj kaj multaj aliaj informoj. "Turka Stelo" estas bonege kaj plaĉe ilustrita kun koloraj fotoj, bildoj kaj desegnaĵoj.

La lingvo kaj stilo de la revuo estas modelaj. Por mi "Turka Stelo" estas fenestro ne nur al nia najbara lando Turkio, sed al la Esperanto-agado tie kaj al diversaj Esperanto-aranĝoj en la mondo. La revuo signife riĉigas Esperanto-kulturon kaj la kulturon de la geesperantistoj, kiuj legos kaj ĝuos ĝin.

Georgi MIHALKOV

Kuiru kun mi

Karaj amikoj, hodiaŭ ni kuiras facilan, rapidan kaj tre, tre bonan recepton: spagetomeleto!

INGREDIENCOJ

500 gramoj de spagetoj
10 ovojn
raspita pamesano
petroselo
pipro
salo
olivoleo



Ni komencu kuiru la spagetojn. Dume, en bovlo ni rompu la ovojn kaj kirli ilin kun forko, ni aldonu salon, pipron, pamesanon kaj petroselon kaj fine la spagetojn. Ni miksu bone la ingrediencojn kune. Ni verŝu la miksaĵon en kontraŭdhera pato enhavanta varmegan oleon, kaj distribu ĝin super la tuta surfaco

de la pato. Ni daŭrigu kuiru super malalta varmego dum 10 minutoj, kovrante la omleto kun kovrilo. Ni turnu la omleto kun la kovrilo kaj lasu kuiru ĝin por aliaj 5 minutoj. Ni tranĉu ĝin en pecoj kaj servu varmega.

Bonan Apetiton!

Fonto: <https://kuirukunmi.com/2014/11/27/spagetomeleto/>



Fariĝu individua membro de UEA



Individuaj membroj de UEA povas regajni la kotizon, parte aŭ plene, utiligante sian rajton je 10-procenta rabato ĉe la

Libroservo de UEA. Membroj kun Gvidlibro aŭ Jarlibro ricevas la rabaton dufoje dum la jaro. Membroj Abonantoj, Dumvivaj Membroj kaj Honoraj Membroj ricevas ĝin por ĉiu mendo. Krome, ĉiuj membroj escepte de Membroj kun Gvidlibro rajtas aliĝi al la Universala Kongreso kontraŭ rabatita kotizo.



Solvo de la kruĉvort-enigma

E	R		A	N	A	R	O		A	R	O	10
	D		R	E	H		K		R	A	R	9
O	N	D		N		O	I	D	V	E		8
M	A		R	O	I	R		F	A	R		7
S	E	J		O	N	G	E	R			O	6
M	I		O		A	M		I	D		O	5
R		O		L	G	A	R					4
O			A	N	U	R			O			3
			U	R								2
A			V	O								1
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	